# HUNGARA VIVO



MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGOTARJÁN

E

3

1970

8,—Ft

# DUM VIA VOJAĜO EN HUNGARIO

vizitu niajn movmaterial-staciojn
En la tuta lando ni estas kompleze
je via dispono.

EKSTRA BENZINO 92. NORMALA BENZINO 86.
OLEOJ „MULTI GRADEN“

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara
Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

*

*1970. X-a jaro, 3-a numero*

*D-ro J. Mátéffy:* Pace vivi unu apud la alia 1
*J. Csurka:* LSD Tr. L. Tárkony 2
*D-ro P. Avar:* János Selye kaj lia stress-teorio 4
Panoramo 6
*Gy. Radó:* La loko kaj valoro de la E-teksto en la historio de la tradukoj de „La tragedio de l'homo" 8
*L. Tárkony:* Poemoj 9
*R. Schwartz:* Botoĉel 10
*G. Vigh:* Intervjuo kun Dr. I. Lapenna 11
*V. Szabó:* Kie troviĝas hungaroj en la mondo? 12
*L. Tárkony:* Revuo de revuoj 13
*K. Jobbágy:* Cégénydányád. Tr. L. Tárkony 14
*S. Weöres:* El „Orbis Pictus", poemoj, Tr. K. Kalocsay 16
Teatra kroniko 20
*János Tóth:* Juneco, Juneco 21
*D-ro I. Szerdahelyi:* Esperanto kaj la moderna lingvoscienco 22
*D-ro J. Mátéffy:* La defendo de artobjektoj en la spegulo de niaj 25 jaroj 24
Najbareco, amikeco 26
*Ada Csiszár:* Nur por virinoj 28
*I. László:* Sporto, Tr. T. Ujlaky-Nagy 29
Leterkesto 30
*L. Lesznai:* Muzika vivo en Budapeŝto 30
Filatelio 31
Krucvortenigmo 32

**Sur la kovrilpaĝo: Juneco**
**Foto de János Eifert**

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:

d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Valeria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

**La redakta komitato la unuan jaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la sesa horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)**

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224—819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

70.69829 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25.377

# PACE VIVI UNU APUD LA ALIA

Senŝanĝe validas en nia socialisma sociordo la principo pri paca apudvivo inter la diversaj popoloj. En ties spirito okazas niaj renkontiĝoj sur tereno de kulturo, ekonomio, scienco kaj politiko kun landoj, kies socia strukturo diferencas de la nia. Ni strebas ekkoni la vivon de aliaj popoloj kaj klopodas sincere kaj objektive prezenti nian patrujon, progresantan sur vojo de socialismo. Tiuj renkontiĝoj do ne okazas kvazaŭ „arto pro arto", male ili celas, ke niaj reciprokaj kontaktoj sur la plej varia kampo de la vivo estu ambaŭflanke fruktodonaj, kaj samtempe ili servu al ĝenerala intereso de la homaro.

En la proksima paseo okazis grandsignifa renkontiĝo inter gravaj politikistoj hungaraj kaj aŭstraj. Nome, post la du mondmilitoj okazis unuafoje, ke la ŝtatprezidanto de la najbara Aŭstrujo venis Hungarlandon. *Je invito de la hungara ŝtatprezidanto Pál Losonczi vizitis nin la federacia prezidanto de Aŭstrujo, d-ro h. c. Franz Jonas* kaj pasigis ĉe ni kelkajn tagojn en Junio 1970.

En amika etoso okazis interŝanĝo de opinioj pri la kontaktoj inter la du najbaraj landoj. Aŭtentike ni aŭdis, ke niaj plej altaj instancoj opinias utila la reciprokan vizitadon de la ŝtatgvidantoj, ĉar tio grave kontribuas por profundigo de la reciprokaj interrilatoj. Unu el la plej grandaj instruoj de nia komuna historia paseo estas, ke la hungara kaj aŭstra popoloj, estimante reciproke siajn nacian dignon kaj ŝtatan suverenecon, volas kaj kapablas vivi kaj labori en kunlaborado, unu apud la alia. Kvankam la socia strukturo de la du landoj estas diferenca, tamen en multaj problemoj de la nuna mondo niaj interesoj estas identaj, ĉefe, koncerne la sekurigon de la paco de nia kontinento.

Plene koincidis la opinio de nia eminenta gasto, kiu interalie menciis, ke niaj ĝisnunaj kontaktoj formiĝis interrilato de bonaj najbaroj, kaj ke ĝuste la danubvalaj landoj povas montri per harmonia agado, ke malgraŭ la ideologiaj dividlinioj, oni povas elformi sinceran kunlaboron en Eŭropa spirito. Li ĝojis, ke ambaŭ niaj landoj samopinias: ne licas apliki perforton por solvi internaciajn problemojn kaj oni devas respekti la pretendon de ĉiuj landoj je ilia sekureco.

Vera ĝojo plenigis, nin, hungarajn esperantistojn pro tiu ĉi altnivela vizito. Ni sciis ja, ke nia gasto estas esperantisto, krome ankaŭ la alta protektanto de la nunjara U. K. en Vieno. Sed nun jam nia tuta lando eksciis pere de la ripetita disaŭdigo de Hungara Radio, ke li estas la unua ŝtatestro, kiu scias perfekte nian Internacian Lingvon, respektive Esperanton. Ni havis la feliĉon persone konvinkiĝi pri tio. Nome, ankaŭ HEA estis invitita okaze de la oficiala akcepto, aranĝita en la Parlamentejo je honoro de ŝtatestro Franz Jonas. La akcepton partoprenis krom la subskribinto ankaŭ la vicprezidanto de HEA, d-ro Stefano Bácskai. Salutante esperantlingve la gaston, akompanatan de hungaraj kaj aŭstraj eminentuloj, li haltis ĉe ni kaj iniciatis konversacion en perfekta kaj eleganta Esperanto. Li dankis la saluton de la hungara esperantistaro, interesiĝis pri la partopreno de hungaroj en la Viena mondkongreso kaj ĉe la adiaŭo li deziris fruktodonan laboron al la hungaraj esperantistoj.

Tiun eventon, iniciatitan de grava persono en grava medio, ni taksas tre utila por nia movado!

d-ro **Jozefo Mátéffy**
prezidanto de HEA

*István Csurka*

# LSD

Filipo Aŭdaca, gvidantarano en la sindikata komitato de skatolfabriko en Vác, fariĝis en septembro de 1969 senatende posedanto de konsiderinda kvanto da LSD. Se paroli pri precize: la nomitan venenon li ekhavis nur kiel deponaĵon. Okazis nome, ke pli ol iom vigla grupo da junaj laboruloj de la fabriko somerumis kun grupa pasporto en okcidento pere de la junulara vojaĝoficejo Express. La longharaj junuloj importis el okcidento LSD, sed, — ĉar esence ili ricevis sandirektan edukadon — ili akiris ja ĝin eksterlande, nome ĝin ŝtelis, sed enpreni ĝin ne kuraĝis. Nur tro multe ili parolis pri ĝi. En ilia klubo konstante resonis: „ni havas LSD, ni havas LSD!" Kaj tiu fanfaronado pli-malpli frue devis ja atingi ankaŭ la orelojn de la urba kaj fabrika gvidantaroj, des pli, ĉar ankaŭ el iliaj infanoj kelkaj partoprenis la ekskurson. Iom post iom la afero mobilizis la tutan socion de la urbo; la urbaj kaj fabrikaj gvidantoj opiniis, ke estas tempo fari finon al la afero. Sed kiamaniere? Finfine ja neniu povis sperti ian ajn realan spuron de la ĉeestanta LSD: la junuloj tiel same enreviĝinte kaj sinforgese dancadis kaj kisadis, kaj tiel same intense laboris, kiel ĝis tiam, kaj montriĝis nenia konkreta pruvo pri iliaj grandiozemaj deklaroj. Samtempe tamen estis nervozige scii, ke en la urbo, en la fabriko troviĝas LSD. Tial, kiam la streĉo jam atingis troan gradon, kaj oni povis timi, ke ĉu en Visegrád, ĉu en Peŝt iu ekscios pri la LSD estanta en Vác, Ludoviko Bonhom, la prezidanto de la sindikata komitato de la skatolfabriko en Vác, vokigis al si Filipon Aŭdaca, kaj jene al li parolis:

— Filipo! Ĉu vi ne pensas, ke oni devus elesplori ĉi tiun LSD-aferon?

— Sed jes, Ludoviko — diris Filipo Aŭdaca.

Ludoviko Bonhom admone levis sian montran fingron.

— Almenaŭ ĝis estos tro malfrue.

— Precize tiel pensas ankaŭ mi.

— Filipo! En la gloraj jardekoj de via sindikata kaj laboristmovada paseo vi jam aranĝis tiel multajn delikatajn aferojn, ĉu vi ne ĵetus denove en batalon vian ĉiekonatan aktivecon?

Filipo Aŭdaca priprensis momenton, poste ekparolis:

— Se la sindikata komitato deziras...

— Ĉi deziras, Filipo.

Jen kial devis Filipo Aŭdaca iri al la junulara klubo kaj pagi pli ol 30 duondecilitrojn da brando al la tieaj korifeoj, por ekposedi „la sekreton de LSD".

Nu do, post tiu ĉi oferema sindediĉo Filipo Aŭdaca eksciis, ke la LSD vere ekzistas, kaj estas netuŝita, kaj estas trovebla en iu poŝo de la farmist-pantalono de Filipo Aŭdaca pli j. en nilon-saketo, jam de monatoj. Filipo Aŭdaca miris pri tio, tiom pli, ĉar lia filo ne partoprenis la menciitan okcidentan ekskurson, sed en la sama tempo li faris ekskurson al Sovetunio, do ŝajnis tute ekskluzivebla, ke li estis akirinta la LSD-on. Sed la junuloj klarigis la aferon:

— Ni konfidis ĝin al li, ke ne estu suspekte.

— La stinka bubaĉo — murmuris inter siaj dentoj Filipo Aŭdaca.

Post tio li iris hejmen kaj per eksterordinare morna rigardo diris al sia edzino, kiu ĝuste purigadis la ŝimiĝintan prunmarmeladon.

— Ĉu vi scias, ke la urba LSD troviĝas ĉe la bubo?

— Mi scias — diris la edzino.

— Kaj kial vi ne diris tion?

— Pli bona estas la paco — diris la edzino.

Filipo Aŭdaca je tio ne faris rimarkon, kvankam kelkaj replikoj venis al li en la kapon; li nur staris kun kuntiritaj brovoj. Post tempeto tamen li ekparolis:

— Kie ĝi estas?

— En la ŝranko — diris la edzino.

Filipo Aŭdaca tion tute ne komprenis, ĉar en la lastaj jaroj li vidis sian filon nur en farmist-pantalono kaj li ne povis imagi, ke ĝi nun ne estas sur li.

Sed la edzino ankaŭ ĉi-rilate donis klarigon:

— De kiam oni plialtigis lian salajron, li portas ŝtofpantalonon.

— Nu, nu! — diris Filipo Aŭdaca, kaj tiam li iris al la ŝranko, serĉis la menciitan cowboy-pantalonon, kaj, post kelka serĉado, en la kvara poŝo li trovis la malgrandan saketon. Li ĝin elprenis, tenis antaŭ si, kaj montris ĝin ankaŭ al la edzino.

— Ĉu ĝi estas tio?

— Jes ja, kio ĝi estus? — diris la edzino.

Filipo Aŭdaca faris profundan, tristan ĝemon, kio esprimis jenon: „mi devis ĉi tion ĝisvivi!" Lia sento estis, ke propre li estas nur viktimo de malbona ŝerco, kaj ke ĝi ne estas LSD. „Nu, ni vidos" — li pensis kaj jene parolis al la edzino:

— Kio estas por vespermanĝo?

— Paprikita terpomaĵo — diris la edzino.

— Jam denove? — kaj dume venis en lian kapon, ĉu oni povas preni LSD post paprikita terpomaĵo. Ĉar li tuj decidis, ke post vespermanĝo tuj li enprenos el ĝi.

Li enprenis el ĝi. Kvanteton sur pinto de poŝtranĉilo, ne pli. Li eliris al la korto, rigardis lontanen, supren al la stela ĉielo. En la unuaj momentoj lin okupis nur tiaj samaj pensoj kiel alifoje: praktikaj demandoj, filozofiaj problemoj, socialaj aferoj. Ĝuste li jam intencis frapi en la aeron, returniĝi kaj eniri en la domon kun la konstato: „diablo ĝin prenu, ĝi ne estas veneno", kiam sur la ĉielo aperis leono kun paraŝuto kaj kun lanta, dignoplena falo proksimiĝis ale al la korto de Aŭdaca.

— Hop-hop — ekmurmuris Filipo Aŭdaca. Do, tamen? Nu, bone, estu tiel. — Dume la leono descendis sur la korton kaj skuis de si la koloran paraŝuton kiel hundo la malsekan littukon. Lante, kun glataj katopaŝoj ĝi proksimiĝis al Filipo Aŭdaca kaj haltis antaŭ li.

— Kiu vin sendis? — demandis Aŭdaca.

— La Landa Konsilio de Sindikatoj — diris la leono.

— Ĉu la centro?

— Certe.

Filipo Aŭdaca kapbalancetadis, nun li jam sciis, pri kio temas.

— Ĉu ili ne sendis selon? — li demandis.

La leono ŝancelis la kapon.

— Karakterize! — diris Filipo Aŭdaca kaj ne tre volonte li sidiĝis sur la dorso de la leono. — Kie do estos tiu konferenco? — li demandis la beston.

— En Kisoroszi — diris la leono.

Ili ekiris. La vojo estis tre kurta. Sed sur la loko de Kisoroszi staris potenca cirkotendo, tiel granda kiel Kisoroszi mem estis antaŭe. Ĝia kupolo atingis la ĉielon kaj ĝi estis tiel ŝtopita per lumo kaj brilego, ke tio preskaŭ sonoris. Aŭdaca devigis la leonon je trotado kaj akompanate de tondra aplaŭdado li venis kun ĝi al la mezo de la areno. La spektejo supren, tute ĝis la galerioj, estis plenigita per imperialistoj. Tion Filipo Aŭdaca ne nur vidis, sed ankaŭ sciis, ĝuste tial li ne lasis, ke la ovacio, la aplaŭdado, la svingado de la bulĉapeloj, cilindroĉapeloj lin ŝancelu sur liaj piedoj, sed per severa rigardo li tramezuris ilin kaj li eĉ ne descendis de sur la dorso de la leono, kvankam ĉi tiu per pluraj nemiskompreneblaj moviĝoj lin instigis al tio. Kiam poste la aplaŭdado ĉesis, el post la kontraŭa kurteno pasis sur la arenon Ludoviko Bonhom en ornamita ora talaro kaj diris al la rigardantaro:

— Kaj nun mi petas kamaradon Filipon Aŭdaca, ke li faru sian prelegon.

Je tio tamen li glitis de sur la dorso de la leono kaj akrigis sian gorĝon.

Lia prelego estis same kurta, kiel lia vojo de Vác al Kisoroszi. Estas eble ankaŭ, ke ĝi estis nura gorĝakrigo, sed pri ĝia efikeco povas esti nenia dubo, nome la venko de la mondrevolucio estis preta fakto post la prelego. La kolektiĝintaj imperialistoj triste sin levis de sur sia loko kaj kun klinita kapo, kiel malvenkintoj, kun pezaj paŝoj iris el la cirko kaj ekstere laŭvice petis pri azilrajto Ludovikon Bonhom, kiu al iuj ĝin donis, al aliaj ne. Poste venis al la areno Ludoviko Bonhom, kaj ankoraŭ multaj el Vác, konatoj, amikoj, kaj laŭvice ili gratulis al Filipo Aŭdaca pro la rapida kaj sensanga aranĝado de la mondrevolucio.

— Jam antaŭlonge oni devus konfidi tion al li — diris iu en la fono.

Jen kio lin plezurigis plej bone. Tuj do li turnis sin al Ludoviko Bonhom:

— Nenio alia estas farenda, Ludoviko?

— Nun, momente, nenio, Filipo.

— Eble mi do foriros.

— Iru nur, Filipo, la ceterajojn nun ni jam faros.

Li ĝuste nur alrigardis la leonon kaj li jam estis kun ĝi en sia korto kaj tie amike batetis ĝian kolon.

— Vi povus ĝin ankaŭ grati iom, kaj ankaŭ mian ventron — diris la leono.

— Volonte. — Kaj li gratis ĝin sur la diritaj lokoj.

— Ĉu vi nun reiros al la centro? — li ĝin demandis dume.

— Jes, eĉ rapide. Sen tio mi jam havas tridek kvin plushorojn en tiu ĉi monato. Kaj matene mi portos eksterlandan delegacion al Szoboszló. Konstante mi estas survoje, kaj mia stomako estas tute malsana.

— Jes ja, la organismo eluziĝas, difektiĝas . . . Mi asertas, ke tiel estas en ĉiu laborfako.

— Nu, mi povus mencii tian, kie ĝi ne tiom eluziĝas — diris la leono, kiu dume komencis tre simili al malnova konato, al certa ŝoforo . . . Kaj kiam li etendis al ĝi la manon super la barilo, ĝi jam estis ŝoforo Balog, la ŝoforo el Kisoroszi, kun kiu li iam kune militistis ĉe la sapeistoj. Nenia leono, nenia cirko, nenia kolorpompo. Kaj tiu ĉi Balog jam ekiris for en la vespero, sed poste li ankoraŭ retroparolis kaj eĉ retropaŝis, pli proksimen al la barilo, kvazaŭ konfidencume:

— Ĉu mi povas demandi ion, kolego Aŭdaca? Vi estas tiel intime orientita ĉi tie, en Vác . . . Ĉu estas io vera en tiu LSD-afero, ĉi tie, ĉe vi?

Filipo Aŭdaca rigardis dure en la okulojn de sia iama kamarado kaj diris enpensiĝinte:

— Ĉu vi rimarkis ion sur mi, de kiam ni interparolas ĉi tie?

— Ne, nenion.

— Nu, vidu, tamen en mi estas unu porcio.

— Ne diru tion! Kaj ĉu vi ne havas viziojn . . . voluptan tikladon, virinojn, striptizon, kaj tiajojn?

— Ĉu mi?

— Tiam ĝi ne estas LSD.

— Certe ne. Sed se jes, tiam ĝi estas malfreŝa, ĝi perdis sian efikecon. Ĉu vi scias, kio estas miaopinie la nuda vero? Oni trompis la bubojn ekstere, en okcidento.

— Sed ili ĝin ŝtelis ja, laŭdire . . .

— Ankaŭ tiam! Tie oni estas pretaj por ĉio aĉa.

— Nu, bone, do ĝis la revido.

— Ĝis la revido, ĉion bonan!

Ankoraŭfoje ili manpremis super la barilo.

Poste la sekvan vesperon, Filipo Aŭdaca denove glutis porcion, ĉar iel la afero ankoraŭ ne lasis lian konsciencon trankvila, ĉefe pro tio, ke li mensogis al sia soldatkunulo, sed ankaŭ pro tio, ke la afero de la mondrevolucio lin tre ekscitis. Li volus ree aŭdi sian tutan parolon, siajn argumentojn, kaj li volus, se la afero ne rekurbiĝus tien ĉi al Vác. Eĉ dufoje li trempis la pinton de sia poŝtranĉilo en la venenon. Li eĉ ne eliris al la korto: li pensis, ke interne, en la ĉambro li atendos la leonon, en la plej komforta seĝo. Sed anstataŭ la leono el la alto falis unue florpluvo, poste li vidis nur grandajn, kolorajn kaj vastajn spacoformojn, aŭdis belegan muzikon, promenis en brila, kolora stalaktita groto kaj sekvis ankaŭ tio, pri kio la ŝoforo de Kisoroszi parolis: virinaj formoj ondadis antaŭ li, kaj fine mem la Bona Dio proksimiĝis, surbrake kun lia patrino. Sur lia patrino estis belega, blanka fianĉina vestaĵo kaj ĝia trenaĵo kilometrolonge, ŝvebante naĝis post ŝi.

Poste ĉiuvespere li glutis el ĝi porcion, dum daŭris la stoko, sed la afero de la mondrevolucio neniam plu prezentiĝis. Poste, kiam Ludoviko Bonhom denove sendis inviti lin, por ke fine li raportu pri la rezulto de sia misio, Filipo Aŭdaca jam iris tien tiastate, ke li estis nur ombro de si mem. Li malgrasiĝis kaj ankaŭ liaj manoj tremis.

— Kio do estas la reala situacio pri la LSD, Filipo?

— En Vác ne estas LSD — diris Filipo Aŭdaca, decide, sed samtempe ankaŭ triste.

— Mi dankas, tion mi atendis de vi. Kaj nun, rekompence de via bona laboro mi volas vin demandi, kia premio estus de vi preferata? Mi aŭdis, ke vi havis ankaŭ konsiderindajn elspezojn. Kion do vi bezonus?

— Pasporton — diris decide Filipo Aŭdaca, kaj alrigardis Ludovikon Bonhom per la iom konfuza, sed obstina kaj kontraŭdiron ne toleranta rigardo de venenitoj.

Tradukis: **Lajos Tárkony**

# János Selye kaj lia stres-teorio

La soldato post vundiĝo, la patrino angoranta pri sia soldata filo, la ludvetanto ŝtonrigide rigardanta la ĉevalvetkuron, ankaŭ la ĵokeo kaj la ĉevalo mem: ili ĉiuj estas en la stato de „stress' (streĉo).

La almozulo turmentata de malsato, la frandemulo preskaŭ krevanta pro la plenŝtopo de sia stomako, la komercisto timeganta bankroton, la mon-magnato ĉaspelanta novajn milionojn: ankaŭ ĉi tiuj estas penetrataj de streso.

La patrineto gardanta la paŝojn de sia trokuraĝa bebo, la infano broginta al si la haŭton, precipe per varmega kafo: ĉiuj ĉi estas sub la efiko de la streso.

Kio do estas ĉi tiu mistera stato, kiu povas tuŝi plej diversajn personojn, milojn da specoj de bestoj, la vivantajn ĉelojn? Jen kion demandis János Selye, hungardevena esploristo, vivanta ekde 1932 en Kanado. La respondon li donis per sia stres-teorio, kaj ĉi tiu teorio en kelkaj jardekoj konkeris la tutan medicinon, ties kaj teoriajn kaj praktikajn branĉojn. Ĝin konigas la mondfama scienculo en sia populara verko: „La streĉo de la vivo" (The stress of life).

Li naskiĝis en 1907 en hungara medicina familio: kaj lia patro kaj lia avo estis kuracistoj. Fininte siajn universitatajn studojn en Praha, la talenta juna doktoro akceptis la inviton de Kanada (Montreala) universitato, kaj tie li, post apenaŭ kvarjara esplorado, aperigis sian unuan grandsignifan publikigaĵon pri la „alarma *reakciono". Ĝi enhavis liajn gravajn observaĵojn pri la akutaj simptomoj de damaĝo atakanta la homan organismon.

Baldaŭ li pluevoluigis kaj plilarĝigis sian koncepton. Tiel li kreis la „ĝeneralan *sindromon de adaptiĝo", kiu klarigis la antaŭajn observojn de liaj hungaraj samlandanoj, *Frigyes Verzár* kaj *Aladár Beznák*. Laŭ ĉi tiuj observoj, la surrena glando pligrandiĝas ĉiukaze, kiam ia ajn ekstera aŭ interna perturbo trafas la organismon.

Cent kaj cent animal-eksperimentojn bezonis Selye, ĝis li sukcesis konstati la tutan „draman" procezon ĉiokazan. Ĝi okazas, se tiel diri, en tri aktoj.

En la unua akto, kiun Selye nomas „fazo de preteco", en la sango plimultiĝas la hormonoj produktataj de la surrena glando-krusto. Ĉi tiuj hormonoj estas destinitaj defendi la organismon kontraŭ la damaĝa efiko, mildigante la *reakcionon de la organismo, malhelpante ke ties troa forto estigu procezojn danĝerajn aŭ eble eĉ fatalajn.

En la dua akto, la surrena glando, sekve de sia pliiĝinta produktado, pligrandiĝas, por ke ĝi povu daŭre sekrecii la necesajn hormonsukojn. Ĉi tio estas la fazo de sukcesa rezisto aŭ „plenumita adaptigo."

La tria akto jam estas nedezirinda fiasko. Selye esperis, kiel li konfesas en siaj rememoraĵoj, ke la defendo-kapablo daŭros pli longe ol la atakanta damaĝo; tiamaniere la organismo estus sekurigita kontraŭ la danĝera efiko-reefiko. Sed la eksperimentaj faktoj ne konfirmis lian esperon. En la tria akto, nome, elĉerpiĝas la produktivo de la surrena glando, kaj — se la damaĝo ne ĉesas ĝustatempe — sekvas la ĝenerala ellaciĝo de la organismo, t. e. la morto.

Selye detale desegnis la cirklon de la disvolviĝo de ĉi tiu adaptiĝa funkcio, sen kiu la estaĵoj ne povus vivi, pli precize: ili ne povus transvivi la „stresojn" kaŭzatajn de perturbaj cirkonstancoj. La stres-reakciono, laŭ la pruvoj de Selye, estas specifa procezo, kvankam la damaĝo ĝin estiganta povas esti de tre diversaj specoj, do ne estas specifa.

Hodiaŭ, pli ol tridek jarojn post la unua publikigaĵo de la juna hungara kuracisto, lia stres-teorio estas mondfama, ĝi kvazaŭ revoluciigis la medicinon en la tuta mondo. La „kortikoidoj", t. e. hormonoj ekstraktitaj el la krusto de la surrena glando, jam estas medikamentoj ne malhaveblaj en la ĉiutaga kuraca praktikado, en medicinfakoj okupiĝantaj pri „akutaj statoj" kaj kronikaj malsanoj.

János Selye kiel homo estas pratipo de konscia scienculo, de senlaca esploristo, neniam ŝanceliĝanta antaŭ iel ajn grandaj obstakloj, sed venkanta ĉi tiujn unu post la alia, kredante ke liaj inventoj servos la bonon de la suferantoj, de la tuta homaro.

Li multe rememoras pri sia malgranda patrujo, pri sia gepatra lingvo, pri siaj kolegoj kaj amikoj hungaraj, kiujn li povis nun jam dufoje saluti ankaŭ persone, kiam la Hungara Scienca Akademio invitis lin prelegi pri sia epokfara teorio. Okaze je lia dua vizito, la Akademio elektis lin inter siajn honorajn membrojn, kiel unun el la plej grandaj fieroj de la hungara popolo, doninta jam al la mondo multajn scienculojn kaj artistojn eminentajn.

**Dro Pál Avar**

---

## *"Subtera sanatorio"*

*En la nordhungarlanda Jósvafő troviĝas la groto "Béke", (Paco), kiun post la apenaŭ dekkvar-jara funkciado oni jam nomas "Mekka" de astmatikuloj. Inter la malsanuloj,- plejparte ministoj,- de la kurac-ripozejo troviĝas pluraj, kiuj de jaro al jaro pilgrimadas ĉi tien por 2—3 semajnoj. Krom la hungaraj ministoj, kiuj bezonas kurcigan-ripozon, ĉiam pli multaj personoj venas el Ĉeĥoslovakio, Francujo, Svedujo, eĉ el Kanado kaj el Usono. La aero de la groto "Béke" estas tiel favora klimato por la malsanuloj, ke post la kurac-periodo ĉe la pulmo-astmatikuloj ĝenerale sekvas unu jara sen simptomoj. Ili pasigas 5 horojn tage en la "subtera sanatorio" kiu havas ĉiam konstantan temperaturon, preskaŭ perfekte senpolvan aeron kun alta relativa vaporenhavo kaj kalcio-ionizaĵo.*

# AKVO-ESPLORO
# AKVO-ELTERIGO
# AKVO-REZERVADO
# AKVO-PURIGADO

## PRI AKVO-PROBLEMOJ STARAS JE VIA DISPONO

NIKEX, HUNGARA EKSTERLANDKOMERCA ENTREPRENO POR PRODUKTAĴOJ DE PEZA INDUSTRIO
BUDAPEST, V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6., BUDAPEST 5. PF. 128.
TELEGRAMOJ: NIKEXPORT BUDAPEST.

NIKEX, HUNGARIAN TRADING COMPANY FOR PRODUCTS OF HEAVY INDUSTRY
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. P.O.B. 128. BUDAPEST 5.
CABLES: NIKEXPORT

NIKEX UNGARISCHES AUSSENHANDELSUNTERNEHMEN FÜR DIE ERZEUGNISSE DER SCHWERINDUSTRIE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. POSTFACH 128.
TELEGRAMME: NIKEXPORT

NIKEX SOCIÉTÉ HONGROISE POUR LE COMMERCE DES PRODUITS DE L'INDUSTRIE LOURDE
BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. B. P. 128. TÉLÉGRAMMES: NIKEXPORT BUDAPEST



# panoramo

La „Hungara Cirko" rolis kun granda sukceso en Irano. Dum ilia trimonata gastrolado plurcentmil vizitantoj ĝuis iliajn prezentadojn. Nia bildo montras unu elstaran grupon de la trupo „SIRIUS 4".

*En la Nord-Hungaria Rudabánya, en la tiea fererca minejo, oni trovis preskaŭ kompletan mandiblon memorigantan pri tiu de homo. Samloke oni trovis makzelo-parton en 1967, sed ĝi estis tro mankhava por permesi pli ol hipotezojn. Nun jam estas sendube, ke temas pri estaĵo vivinta antaŭ 8 milionoj da jaroj, jam ne simio, sed ankoraŭ ne antaŭhomo, apartenanta al branĉo de antropoidaj simioj. Tamen, ĝi jam estis pli progresa tipo ol tiuj simioj: pli delikata estas la staturo, malpli granda la dentaro, pli homeca, malpli elstaranta la vizaĝkranio.*

*Agnes Roboz, hungara koreografino vojaĝis laŭ invito al Hago kaj Parizo por instrui tie hungarajn popoldancojn.*

Okazis io rara ĉe la angla muzika revuo „Tempo". La revuo de internacia famo eldonis antaŭ unu jaro hungaran numeron kaj ĝi tute elĉerpiĝis, tiel ke oni nun faris el ĝi postpreson.

*La Viena Universitato ĉiujare donacas sian Herder-premion al tiuj, kiuj akcelas la kulturajn kontaktojn kun la popoloj de Orienta kaj Sudorienta Eŭropo. Ĉi-jare la premion oni transdonis en la Scienca Akademio de Vieno al Prof. J. Biolostocki (Pollando), historiisto Prof. J. Filip (ĈSSR), etnografo Milovan Gavazzi (Jugoslavio) Prof. J. A. Papaioannu (Grekio), filozofo Dro Zeko Torbo (Bulgario), hungara verkisto kaj tradukartisto Zoltán Franyó (Rumanio), poeto kaj dramverkisto Gyula Illyés (Hungario). Per la du premiitaj hungaroj oni nevole rememoras, ke Herder (1744—1803) antaŭdiris la nepostlongan pereon de la hungaraj lingvo kaj kulturo.*

En la Foiro de Leipzig tri hungaraj produktaĵoj estis premiitaj ĉi-jare: elektrohidraŭlika kopio-maŝino de la Ilmaŝina Fabriko en Esztergom, aŭtomata precizeca nivelilo de Hungara Optika Uzino (MOM) kaj kompleksa generatoro por kolora TV de Telekomunika Metia Kooperativo.

*En la mondfama Guggenheim-Muzeo en New York malfermiĝis ekspozicio el la artaĵoj de la hungara László Moholy Nagy, ĉefe el pentraĵoj kaj relative malmulte el liaj kreaĵoj faritaj en la kadro de la arkitektura „Bauhaus". New York Times notas en dimanĉnumera artikolo, ke la pentraĵoj de la artisto malpli spegulas la elstaran signifon de lia arto, ol liaj kreaĵoj en la parencaj artobranĉoj; li estis ja unu el la gvidantoj de la Bauhaus-movado, li eksperimentis plej multe pri la arta tekniko kaj ankaŭ liaj teoriaj verkaĵoj estas konsiderindaj.*

En la ĉi-jara septembro estos la 25-a datreveno de la morto de *Béla Bartók*. Krom en Hungario, en tridek landoj oni memoros pri li per koncertoj, prezentado de operoj kaj ekspozicioj.

*„Psalmus Hungaricus", ĥor- kaj orkestro-verko de Zoltán Kodály, estis prezentita en New York. Laŭ la jurnalo New York Times, la publiko, plenpleniginta la koncertejon Carnegie Hall, akceptis ĝin kun aplaŭdego. Laŭ la kritikisto de la gazeto, Kodály tenas sin pli strikte al la tradicioj ol Bartók, sed lia muziko estas nepre tiu de la XX. jarcento.*



Béla Bartók

# panoramo•panoramo

*Okaze de la jubileaj festoj la 3-an de aprilo — krom multnombraj aliaj establaĵoj — ekfunkciis la budapeŝta Metro. Nun krom la plej malnova subtera elektra fervojo de la mondo (1896) la plej novan havas la budapeŝtanoj. La unua sekcio de la linio oriento-okcidento kondukas 15—35 metrojn malalte sub la Peŝta urboparto ĝis la linio de Danubo. Ĝia daŭrigo en la Budaa urboparto grandparte jam estas preta kaj antaŭvideble oni ekfunkciigos ĝin en 1972. Laŭ la linio pli ol 10 kilometrojn longa troviĝas 11 stacioj, el kiuj 7 ekfunkciis.*

*En la tago de la malfermo vizitis kelkcent miloj la novan subteran fervojon, kiu nuntempe trafikas kun tri vagonaj trajnoj. Oni jam komencis la konstruadon de la linio norda-suda, kiu estiĝos kun 19 stacioj laŭ la 15 km-ojn longa linio kaj certigas senperan aliĝon kaj al la linio orienta-okcidenta de la Metro kaj al la malnova subtera fervojo.*

Vizitante Hungarion uzu la servojn de

IBUSZ

la plej malnova vojaĝagentejo de la lando.

Hotelĉambro-rezervado
Aranĝo de pasport-kaj enirvizoafero
Aĉeto kaj vendo de eksterlandaj valutoj
Biletoj por aeroplano, ŝipo kaj trajno

Ekskursoj kaj programoj
Urbospektadoj
Servo de fremdulgvidantoj kaj interpretistoj
Senpaga konsildona servo en vojaĝaferoj

IBUSZ AGENTEJOJ EN ĈIUJ URBOJ DE LA LANDO

RERPEZENTEJOJ:
ĉe limstacioj en hoteloj kaj ripozlokoj

VI ŜPARAS MONON KAJ TEMPON UZANTE NIAJN SERVOJN

IBUSZ agentejoj eksterlande

| | | |
|---|---|---|
| Amsterdamo | Moskvo | Romo |
| Berlino | Otavo. | Saopaolo |
| Bruselo | Parizo | Stokholmo |
| Frankfurto | Prago | Vieno |
| Londono | Riodeĵanejro | |

György Radó

# La loko kaj valoro de la Esperanta teksto en la historio de la tradukoj de "La tragedio de l'homo".

La drama poemo de Imre Madách, mondfama klasika kreaĵo de la hungara literaturo, havas, laŭ nia scio, jam preskaŭ sepdek tradukojn en dudek ses lingvoj. Tiuj sepdek tekstoj, ĉu el artisma ĉu el literaturhistoria vidpunkto, kompreneble havas diversajn valorojn: de majstraĵoj ĝis preskaŭ ridindaj fuŝaĵoj. Ekzistas mondlingvo, ekzemple la hispana, en kiu ni ne konas eĉ unu tradukaĵon; ekzistas lingvo, la germana, en kiu pli ol dekduo da tradukoj aperis presite kaj kelkaj el ili eksonis ankaŭ sur scenejo; oni eldonis ĝin en lingvoj de foraj landoj: japane, arabe, hebree ktp.; el la nun pretiĝanta armena traduko kelkaj partoj jam aperis en revuo; kaj ekzistas eĉ tia lingvo, la slovaka, en kiu, en la daŭro de duonjarcento, tri eminentaj poetoj — samtempe perfektaj konantoj de la hungara lingvo — interpretis ĝin kun maksimuma artisma fideleco, kaj ĉiuj tri tekstoj havis siatempe sian lokon kaj sencon.

Kian lokon okupas la E-a traduko, verko de *Kálmán Kalocsay* en tiu ĉi riĉa spektro, kio estas ĝia speciala celo, senco? Ĉe la aliaj lingvoj ni ne lanĉus ĉi tiun demandon: estas ja nature, ke poeto-tradukisto volas prezenti sialingve iun ĉefverkon de la mondliteraturo. Sed la E-a teksto certe havas alian rolon ol la nacilingvaj tradukoj, eĉ se ni malatentas la senscio-naskitan, plie malbonvolan kaj nun jam pli kaj pli maloftan kontraŭargumenton, ke E-o ne estas vivanta lingvo, sekve malhavas la literaturan flekseblecon de la vivantaj lingvoj. E-o povas plenumi tre gravan rolon, tiun de peranto; ĝuste el la multfaceta praktiko de K. Kalocsay mi povas mencii kazon pri tio: kvankam ne sciante pole, li kungenie interpretis polan poemon el E-o en la hungaran lingvon.

Sed se verko jam prezentiĝis en tiom da lingvoj, kiel *La Tragedio de l'Homo*, kaj se krome li vivas viglan vivon, aperas sur la scenejo diverslande, tiam rajte doniĝas la demando, ĉu ne estas superflua ĉi-okaze, ke E-o funkciu kiel peranta lingvo.

Nu, senkonsidere de tio, ke ĝia peranta funkcio ankaŭ ĉi-okaze necesas en tiel grandaj lingvoteritorioj, kiel ekz-e la mondo de la hispana, portugala aŭ la hindujaj lingvoj — tiu ĉi traduko de K. Kalocsay pruvis, ke *la E-a traduko povas havi valoron memstaran, en si mem alte takseblan, artisman, sendepende de ĉia perada, kono-riĉiga, kompreniga tasko.*

Koncerne tiun tradukon, la iniciato ne apartenas al K. Kalocsay: li mem atentigas en la postparolo de sia traduko eldonita en 1924, ke ankaŭ *Adolf Altenburger* kaj *Róbert Schatz* jam okupiĝis pri la tradukado de la verko. Sed mankas indikoj, kiom el tiuj tradukoj aperis presite.

Unuafoje en la oka jarkolekto de La Verda Standardo, monata revuo de la hungaraj e-istoj, aperis E-lingve fragmentoj el la drama poemo de Madách (1913). La tradukinto estis *Géza Bárczi*, akademiano, Kossuth-premiito, ankaŭ nun elstara figuro de la hungara lingvistiko; tiam li sin subskribis *Cezaro Bárczi*. El la dekvin bildoj ses estis publikigitaj. Tio estis granda antaŭensvingiĝo: la unua fragmento aperis ĉe solena okazo en la tempo de la hungara E-kongreso (19—21. Augusto, 1913). Sed kiam la tradukinto transprenis la redaktadon de la revuo, la kontinua publikigado ĉesis. Poste, en Junio 1914 aperis ankaŭ unu lasta fragmento. Kaj sekvis la mondmilito, faris finon al la eksperimento de la unua traduko.

K. Kalocsay, kiu tiam estis jam e-isto, partoprenis tiun mondmiliton kiel militkuracisto. Sed apenaŭ kelkajn jarojn post la milito li aperigis la plenan tradukon de *La Tragedio de l'Homo*.

La traduko, farita formfidele kiel tiu de Bárczi, estis eldonita de la Hungara E-Instituto kun la klasikaj ilustraĵoj de Mihály Zichy. Dudek kvin ekzempleroj estis presitaj sur luksa papero, binditaj lede, subskribitaj propramane de la tradukinto. Aparta valoro de la eldono estas la enkonduka studo de la tradukinto, populariginta plezurige kaj koncize la problemaron de la verko jam en 1924 — do en frua fazo de ties mondkariero. La notoj de la tradukinto donas interesajn indikojn al la historio de la E-a metriko.

Ŝajnis, ke naskiĝis definitiva teksto en E-o, kaj se la verkon, kies ekzempleroj rapide elĉerpiĝis, oni eldonos ree, tio okazos per la represo de la neŝanĝita teksto.

Sed post pli ol kvar jardekoj, en 1965, la nova eldono, aperinta ĉe la Budapeŝta eldonejo „*Corvina*" alportis veran surprizon filologian.

Kiam enkonduke ni ellevis kelkajn indikojn el la riĉa kaj bunta historio de ĉiuj tradukoj de la drama poemo de Madách, ne hazarde ni emfazis, ke slovake tri eminentaj poetoj interpretis eminente la verkon, kaj *ĉiuj tri tekstoj havis siatempe sian lokon kaj sencon.*

„La klasikulojn ĉiu generacio devus retraduki" — skribis antaŭparole *Jenő Mohácsi*, eminenta germana tradukinto de *La Tragedio de l'Homo*. Kaj se ĉi tio validas pri la ger-

LAJOS TÁRKONY

## DUDEKKVIN JAROJ EN BUDAPEŜTO

*Loĝdomoj, pontoj, stratoj, fabrikoj kaj uzinoj*
*ja faŭkis traboritaj per murdmalsataj bomboj.*
*Aspektis urbopartoj kiel la katakomboj,*
*okuloj larmobrilaj rigardis al ruinoj.*

*Sed spite al ĉi ĉio la brakoj kaj maŝinoj*
*vivserĉe sin ekmovis: la truojn tegis plomboj,*
*rapide malaperis animaj, korpaj ŝlimoj*
*kaj sur la domtegmentojn reflugis la kolomboj.*

*Dudekkvin jaroj pasis: ĉesis ĉia perturbo,*
*de vigla vivo pulsas la luma, fea urbo.*
*Jam fino al mensogo, malamo, superstiĉo:*

*vespere kandelkrone brilas la Buda-montoj,*
*en lumaj ondoj naĝas la renaskitaj pontoj,*
*Labor' tra l'urbo spiras triumfe kaj Feliĉo!*

## KUNMANĜANTOJ

*Mi sidas ĉe tagmanĝo en la restoracio*
*memserva, sidas sola apud kvarseĝa tablo,*
*kuleras mian supon, kaj jen, kun rid-afablo*
*pri loko tie petas juna generacio,*

*geknaboj Vjetnamiaj, gefiloj de nacio*
*heroa en suferoj kaj en batalkapablo,*
*kaj ĉarma: mi orelas pri la sonor-agrablo*
*de l'viglatona tamen softa konversacio.*

*Sed foje-foje haltas manĝiloj, haltas vortoj,*
*kaj kvazaŭ rigidiĝus subite la risortoj,*
*senmove la okuloj rigardas en la foron . . .*

*Eble samtempe hejme, vilaĝe aŭ naskurbe,*
*bomboj el Bo-52 ĉantaĝas mond-perturbe,*
*frakasas iun karan, amatan frato-koron.*

mana lingvo, polurita per mult-centjara literaturo, des pli ĝi validas, kompreneble, pri la junliteratura slovaka lingvo, evoluanta, ĝuste pro la juneco de sia literaturo, rapide kaj elaste. Jen kial povis naskiĝi tri plenvaloraj tradukoj de la verko, el kiuj ĉiu havis la saman signifon en sia epoko.

Eĉ pli multe validas la principo de Mohácsi koncerne la lingvon Esperanto, ne nur pro tio, ke ĝi mem kaj ĝia literaturo estas junaj, sed unuavice pro tio, ke en ĝia vivo kaj evoluo la literaturo havas specialan rolon: *formante ĝi formiĝas.* Ĉi tio estas ja valida ankaŭ pri la alilingvaj literaturoj, sed ĉe tiuj efikas ankaŭ multaj aliaj lingvaj faktoroj krom la literaturo — por E-o, siavice, la propra literaturo estas demando de esto aŭ neesto.

La verkinto de ĉi tiu artikolo ne estas fakspertulo aŭ praktikanto de E-o, nur ĝia amiko kaj estimanto, sed ankaŭ tiamaniere li scias, ke la e-istoj, kape kun Zamenhof, ĉiam klare vidis, kiel ilia lingvo kaj movado povos elteni la provon de la tempo: nur tiel, se ili kreos vivkapablan literaturon, kaj ne sole el sentimentaj aŭ propagandistaj pripensoj sed unuavice el tiu konsidero, ke *la literature nuancita pensesprimo estas la plej bona lingvoevoluigilo.*

Tiu fakto kaj la retraduko de la Madách-a verko sin motivas reciproke. Sed la granda filologia surprizo estis, ke kion en la slovaka lingvo dum duonjarcento plenumis tri grandaj poetoj (Pavel Országh-Hviezdoslav, 1905; Valentin Beniak, 1950; Ctibor Stitnicky, 1966), tion saman en la lingvo Esperanto, en tempodaŭro malpli per dek jaroj, efektivigis unu sola poeto-tradukisto: K. Kalocsay: kvar jardekojn post la unua plena traduko li donis novan tekston al la nova stato de la lingvo-evoluo.

Tiu lingvo-evoluo ebligis al li, ke partojn, kiuj en la unua versio interpretiĝis ankoraŭ disetendite, diluite, en la dua eldono li jam reproduktis kun la koncizeco responda al la originalo. Sed ĉi tio estas nur la malpli granda kategorio de la modifoj. Ilia pli granda parto konsistas el plibonigoj kaj poluraĵoj ne tiom okulfrapaj, sed en sia tuto multe levantaj kaj plifortigantaj la artisman sonoron de la traduko.

De post la hungarlingva apero de *La Tragedio de l'Homo*, jam de pli ol cent jaroj, unu punkto de la diskuto pri ĝi tenata estas, ĉu ĝi estas nur librodramo por legado aŭ verko por scenejo. Ĝiaj prezentadoj Hungariaj kaj eksterlandaj konfirmas la pravon de tiuj, kiuj pledas por ĝia scenej-taŭgeco. Kaj ĉi tio certigas al ĝia E-a traduko specialan lokon kaj valoron. Nome, la menciita tezo de Zamenhof, ke la vivon de la lingvo garantias ĝia literaturo, nun jam estas plivastigebla: la ekzistanta kaj vivkapabla literaturo bezonas *vivantan interligon kun la parolata lingvo* kaj ĉi tiun ĝi ricevos per la sistema drama prezentado de verkoj. La unua paŝo estas deklamo de E-aj poemoj kaj tradukoj, la decida paŝo estas unue la oratoria, poste la teatra prezentado de dramaj verkoj.

La E-a scenejo, ĉu ĝi estas nur literatura podio ĉu teatro kun kulisoj kaj kostumoj, bezonas tiajn verkojn, kiuj disponas ne nur pri la ĝeneralaj kriterioj de bonaj teatraĵoj, sed estas jam anticipe bone konataj de la publiko, tiel ke iliaj frazoj kvazaŭ sonoras en la oreloj de la spektantoj. Ili devas ja paroli ne sole al la e-istoj, sed ankaŭ al tiuj, kiuj malmulte aŭ tute ne scias la lingvon. Ĉi tiuj prezentadoj nome havus ankaŭ la taskon varbi por la movado pluajn adeptojn. Krom la mondkonataj verkoj de Shakespeare, Molière kaj aliaj, ankaŭ *La Tragedio de l'Homo* devas havi sian lokon en la estonta granda repertuaro de la E-a scenejo. Eĉ — almenaŭ en Hungarlando — ĝuste tiu ĉi verko povus *svingi antaŭen la evoluon kaj prosperon de la E-a teatra movado.* Jen ankoraŭ fakto, kiu certigas specialan lokon kaj valoron al la altnivela artisma traduko de K. Kalocsay.

# Botoĉel

de Raymond Schwartz

*Evidente, tia sceno ŝajnus hodiaŭ tute nekredebla, sed oni devas ne forgesi, ke la kazerna vivo, en ĉiuj armeoj de la mondo, ne estis ĉiam tiel agrabla kaj komforta, kiel ĝi estas nun. Ekzistis tempoj, kiam superulo, eĉ se nur malalte lokita sur la ŝtuparo de l'hierarkio, kondutis neĝentile kontraŭ siaj subuloj, ne nur parole, sed ofte ankaŭ geste. Tiuepoke, ekzemple, oni povis aŭdi sur kazernokortoj, el la buŝo de ia galonito, insultojn kaj krudaĵojn, kiuj postvivas hodiaŭ nur en la repertuaro de incitiĝemaj aŭtomobilistoj. Kaj tiuj tempoj estas ankoraŭ ne malproksimaj. Tion pruvas la travivaĵo de soldato Kifif.*

*En la civila vivo Kifif, bonintenca simplulo, estis komizo en provincurba magazeno, „komizo laborema, honesta, bonkonduta," kiel certigis atesto de lia mastro, kun — tamen — tiu ĉi aldono: „kiu neniam ion inventis." Sed tia estas la egaliga leĝo, ke ankaŭ tiuj, kiuj neniam ion inventis, devas soldatservi. Do ankaŭ Kifif, komence de 1939, fariĝis rekruto en studogrupo, gvidata de serĝento Berzerker. Sub tiu ĉi nomo, almenaŭ, la serĝento sin prezentis al la novaj kursanoj. Nu, strange estas, kiel rapide en kazernoj, ankaŭ en malliberejoj, komunikiĝas tuj al ĉiuj novuloj informoj pri karaktero kaj manioj de superuloj kaj gardistoj! Jam la unuan tagon la rekrutoj de serĝento Berzerker sciis, ke lia kromnomo estas Botoĉel. Ho! Kial Botoĉel? Tion ili komprenis iom poste.*

*Fakte, la novaj rekrutoj baldaŭ rimarkis, ke la serĝento uzadas kaj misuzadas certan kliŝesprimon. Se iu, post la komando „dekstren!" ne movis sin ekfulme, tuj la serĝento intervenis per minaca „ĉu kunlaboru mia boto ĉe l'postaĵo?" Aŭ al naivulo, petinta duonhoran forpermeson, li mokaĉis: „Jes, kuniklo, vi iros kun mia boto ĉe l'...". Li eĉ asertis al unu, kiu ne sukcesis staradi ŝtone-senmove en la vico: „Mi rompos vian faŭkon helpe de mia boto ĉe l'postaĵo!" kia procedo evidente ne respondas al principoj de l'plej rekta metodo. Tamen, estis rimarkinde, ke Botoĉel ankoraŭ neniam efektivigis la minacon. Kaj tiurilate Kifif trankviligis siajn kamaradojn: „Li ne kuraĝus! Tio estus kontraŭ la homa digno kaj havus gravajn konsekvencojn."*

*

*Tiun tagon la kapitano ordonis al siaj serĝentoj: „Post dek minutoj mi volas vidi ĉiujn grupojn sur la korto, en drelikvesto, por inspektado de la tualetartikloj!" Jam la serĝentoj kuregis, ĉiu al sia grupo: „En drelikvestoj ĉiuj tuj sur la korto, kun la tualetartikloj!" — Abelujo, en kiun enfalis urso, ne agitiĝus pli ekscite. „Kie mia pantalono? Kaj la jako? Merd'! rompiĝis butono! Broso, mantuko, kombilo, sapo, razilo ... Ne forgesu la ĉapon! Preta!" Unu post la alia kaj, laŭ opinio de Botoĉel, multe tro helikmove, iom post iom ĉiuj rekrutoj viciĝis sur la korto. Ĉiuj, aŭ preskaŭ. Mankas unu! Furioze Botoĉel rerapidis al la ĉambrego. Apenaŭ sur la sojlo, li grakis: „Kion vi fuŝas ĉi tie? Ĉu kun mia boto ...?" — „S'joro serĝento, mi ne retrovas mian dentopaston." — „Dentopaston? ĉu vi volas moki? Eksteren tuj!" — Kaj preterpasante la serĝenton, bumm, Kifif havis la boton ĉe l'postaĵo.*

*La scenon ĉeestis nur unu atestanto, la rekruto Gimpal, kiu, pro akutaj kolikoj, restadis deĵorlibera. Pere de Gimpal diskoniĝis la novaĵo. Ŝprucadis la mokincitoj. „Kaj via homa digno? Trafita en sia sidejo!" Vane Kifif fanfaronis: „Tion mi repagos al Botoĉel! Estas ĵurite!"*

*La homo proponas .... kaj la homoj kanonas. Eksplodis la milito. La regimento de Kifif marŝadis al la landolimo, kie ĝi tuj embuskis ĉe arbarorando, fronte al la malamikoj. Por Kifif la situacio estis klara. Post rapidkurso de propaganda oficiro li konis parkere la militcelojn de la batalantaj nacioj, sed pli obsede priokupis lin nur lia propra militcelo: la dorsa centro de l'serĝento. Tiurilate li estis optimista. Pli facile ol sur kazernokorto, en tiu ĉi granda arbaro doniĝos okazo por izola renkontiĝo kun la serĝento, inter densaĵo de arbustoj, sen ia atestanto. Tiam Kifif per sama mono repagos sian ŝuldon al la homa digno. Jam, antaŭĝue, li ridetis ... Sed ve! ĝuste tiam serĝento Berzerker, laŭ supera decido, estis promociita ĉefserĝento kaj — translokita al alia taĉmento! Plue, la saman nokton la malamikoj atakis en la sektoro de la regimento. Ambaŭflanke oni terure bataladis ĝis la mateno. Restis multaj vunditoj sur la tereno. Kiam la malamikoj retiriĝis, Kifif sciis, ke por li finiĝis la milito: Kuglo frakasis lian dekstran genuon!*

*

*En la ĉe-fronta lazareto seriozmiena kirurgo, kitelvestita, kun kuspitaj manikoj, firme decidis: Tuja amputo! Kaj jam la soldato Kifif endormiĝis, cedante al kaptanta perforto de armea kloroformo. Kiam li revekiĝis, postrestis al li nur unu kruro. Sed pri tio li certiĝis nur kelkajn tagojn poste, kiam, ne plu sub influo de anestezo kaj narkoto, li povis dum mallongaj paŭzoj rekonsciiĝi. Tiam okazis, ke kvazaŭ ŝiriĝinte el abomena sonĝo li provis relevi la buston kaj demandis la deĵorantan flegiston: „Mia kruro? Kio fariĝis el ĝi?" — Nu, kiel laŭleĝa posedanto de la kruro, li ja rajtis fari la demandon. La flegisto respondis: „Ne zorgu! Ĝi ricevis krurodignan enterigon." — „Enterigon? Kiamaniere?" — „Kun granda honoro por vi. Oni aldonis ĝin en la ĉerkon de iu ĉefserĝento, mortinta la antaŭtagon." — Ekjubilis espero en la febraj okuloj de Kifif: „Ĉefserĝento? Ĉu Berzerker?" — „Jes, ŝajnas, ke tio estis la nomo." — Ekscitite Kifif sciavidis pli: „Kaj kiel oni lokis la kruron en la ĉerko? Diru kiel! Respondu do!" — Agacite de tia teda demandaro la trookupita flegisto asertis seke: „Ĉe l'postaĵo!"*

*La rideto de Kifif limtuŝis ĉielan beatecon, dum, liberigite de ĉia ŝuldo, li reglitis en bonfaran dormon.*

*En la kadro de la donitaj cirkonstancoj oni ne povis atendi pli moralan konkludon.*

# La prezidanto de UEA en Hungario

## — Intervjuo kun Profesoro Dr-o Ivo Lapenna —

Demando: Kiam vi vizitis, Dr-o Lapenna, Hungarion la unuan fojon?

*Respondo: En 1929, kiam mi ĉeestis mian unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto. Poste mi estis ĉi tie en aprilo 1966, kiam mi venis por faka studo kiel juristo. La trian fojon mi vizitis Budapeŝton dum la Universala Kongreso en la sama jaro kaj nun mi venis la kvaran fojon.*

Demando: Kio kondukis vin ĉi-tempe al nia lando?

*Respondo: Mi havis inviton al Hungario, doublan inviton: la aranĝantoj de la Somera Esperanto-Universitato en Gyula invitis min por prelegi tie kaj ankaŭ la Hungara Esperanto Asocio (kune kun la Hungara Instituto Por Kulturaj Interrilatoj) invitis min por pritrakti aktualajn demandojn de la Esperanto-movado en tiu ĉi parto de la mondo. Tre volonte mi akceptis ambaŭ invitojn.*

Demando: Ĉu vi havis bonajn impresojn en Gyula?

*Respondo: Pri Gyula kaj la Somera Esperanto-Universitato mi aŭdis pli frue kaj la raportoj pri tiuj aranĝoj estis tre laŭdaj. Do estis por mi plezuro foje partopreni persone kaj kontribui al la laboro de tiu kultura instanco.*

Demando: Pri kio vi prelegis?

*Respondo: Pri la Rolo de la Esperanto-movado en la Moderna Mondo.*

Demando: Kio estis la plej grava konkludo de via prelego?

*Respondo: Unue mi koncize prezentis la grandegan progreson, kiun faris la scienco kaj teknologio en la lastaj jardekoj. Tio, interalie, kaŭzis, ke neeblas disvastigi kiun ajn ideon sen aplikado de sciencaj metodoj, ĉar scienca traktado de ĉio fariĝis postulato de la nuna epoko. Alia fenomeno estas la kreskanta rolo de t.n. premgrupoj en ĉiuj socioj. Prenante en konsideron la du elementojn mi klopodis analizi la rolon de UEA: la sciencajn metodojn, kiujn ĝi aplikas por la disvastigo de la lingvo, unuflanke kaj la rolon de UEA kiel premgrupo en internaciaj rilatoj kaj en landaj kadroj, aliflanke.*

Demando: Kio estas via opinio pri la karaktero kaj funkcio de la Somera Esperanto-Universitato?

*Respondo: Mi taksas tre alte la valoron de tiu institucio. Dank' al sindonaj organizantoj, precipe Prefesoro Imre Kádár, kiel ankaŭ dank' al la subteno de lokaj kaj departementaj instancoj, la SEU evoluis en kelkaj jaroj al altnivela kultura renkontiĝo kun unuarangaj prelegoj pri aktualaj temoj. La prelegantoj estas kompetantaj specialistoj en siaj respektivaj fakoj, kio garantias la kvaliton.*

Demando: Kaj kio okazis post la SEU?

*Respondo: Post la partopreno en la SEU mi venis al Budapeŝto kiel gasto de HEA kaj la Hungara Instituto Por Kulturaj Interrilatoj. Tie mi havis okazon priparoli plurajn demandojn kun diversaj instancoj. Min akceptis altrangaj gvidantoj en la Landa Konsilantaro Sindikata, en la Hungara Instituto Por Kulturaj Interrilatoj (Vicprezidanto Sándor Demeter) kaj mi havis tre agrablan kaj utilan renkontiĝon kun vic-ministro de justico dr-o Imre Markoja. Mia vizito en la Hungara Instituto Por Kulturaj Interrilatoj estis grava el vidpunkto de la helpo, kiun donas la Instituto por publikigi Esperanto-tradukojn de valoraj literaturaj verkoj. Mi celas precipe al la elektitaj poemoj tradukitaj de Kálmán Kalocsay, kiuj estos jam publikigitaj, kiam ĉi tiu intervjuo aperos en Hungara Vivo. La fakto, ke ŝtataj instancoj en pluraj socialismaj landoj apogas la E-movadon, klare indikas, ke la Internacia Lingo kaj ĝia rolo en la mondo estas alte aprezataj.*

Demando: Kaj nun, tute alia afero: ĉu vi regule legas Hungaran Vivon?

*Respondo: Jes, mi regule legas vian revuon kaj trovas ĝin tre interesa. Ĝi kontribuas al la riĉigo de la Internacia Lingvo per nova kultura enhavo. Mi opinias, ke la renovigita Hungara Vivo malsamas de la malnova kaj estas eĉ pli bona ol la antaŭa. La modernaj desegnaĵoj signife modernigis la aspekton de la revuo. Laŭ mia opinio Hungara Vivo en la nova vesto plene kontentigas la postulojn de progresema, moderna kultura revuo. Ĝia enhavo estas valora, ĝia lingvo estas tre bona. Aldone al la diversaj desegnajoj kaj reproduktaĵoj ankaŭ la ĉerta enpaĝigo donas al ĝi viglecon.*

Demando: Kiajn impresojn vi gajnis, Sinjoro Profesoro, dum via nuna vizito ĉi tie pri Hungarlando?

*Respondo: Mia impreso estas, ke la lando faris grandegan progreson en la lastaj kvar jaroj, nome ekde la Universala Kongreso en 1966. Bonan impreson mi havis jam ĉe la landlimo, kie la formalaĵoj estis minimumaj. La ŝoseoj estas konsiderinde plibonigitaj. La magazenoj kaj butikoj estas plenaj de varoj, ne nur en Budapeŝto, sed ankaŭ en la provinco. Multaj domoj estas renovigitaj kaj tutaj kvartaloj novkonstruitaj. Bonegaj manĝaĵoj abundas en la restoracioj kaj nenie mi rimarkis vostojn antaŭ la butikoj. Ankaŭ la nombro de aŭtomobiloj kreskis tiel, ke oni apenaŭ povas trovi lokon por parki. Sed pleje impresis min la granda ĝentileco de la homoj, ne nur de esperantistoj, sed ĝenerale de la popolo.*

*Revenante al Esperanto: tiu ĉi mondoparto estas la plej matura por efika agado por Esperanto. Temas pri nombro de najbaraj landoj (Hungario, Austrio, Jugoslavio, Rumanio k.t.p.), ĉiuj kun elstaraj kulturaj tradicioj, sed kun malsamaj lingvoj. La klopodoj por vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj tre verŝajne unue sukcesos en tiu ĉi mondoparto.*

— Dankon, Dr-o Lapenna.

La 16-an de julio 1970

**Gábor Vigh**

Valéria Szabó

# Kie troviĝas hungaroj en la mondo?

*La ideon por paroli pri tiu temo donis al mi iu belga samideano, kiu petis de HEA E-lernolibron en hungara lingvo, ĉar li volis allogi al Esperanto la hungar-devenajn kunlaborantojn . . . per helpo de ilia gepatra lingvo. Mi ne scias, ĉu sukcesis aŭ ne la „allogo" al Esperanto, sed tio estas certa, ke la iama gepatra lingvo kaj la popola tradicio restas konservita — dum jardekoj eĉ jarcentoj — en la hungaraj kolonioj, ĉie en la mondo. Povas esti, ke la nova generacio jam ne komprenas nian lingvon, kaj apartenas jam al la nacio de la nova patrolando, sed — neniam povas ĉesi ilia sento kaj interesiĝo pri la lando kaj popolo, el kiu elmigris iam la gepatroj . . . Mi petas la karajn legantojn, bonvolu helpi nin por trovi la hungardevenajn ĉie en la mondo, kaj — per nia komuna E-lingvo — „allogi" ilin al nia komuna celo en la Esperanta mondmovado . . . .*

*„Mi ŝatas la hungarojn — diris Roosevelt —, ĉar ili estas eksterordinare laboremaj homoj, fariĝis fidelaj filoj de USA. En la koro ili restis fidelaj ankaŭ al la iama patrolando . . ."*

## Nord-Ameriko

*Kiam Roosevelt esprimis tiun opinion, en Ameriko jam estis 1,5 milionoj da hungaraj enmigrintoj — kaj kiam ili alvenis tien, la nepoj de la Mayflower-vojaĝantoj fariĝis jam la reganta klaso de la amerika popolo. Estas historia fakto, ke la evoluo de Nord-Ameriko egalas al la rezulto de la komuna laboro de la enmigrintaj diversaj nacioj — inter ili estis ankaŭ la hungaroj. Samtempe kun la amerika evoluo okazis en Eŭropo la granda ŝanĝo en la cirkonstancoj de la socia produkto, kiu — plejparte pro la disfalo de la feŭdala produkta rilato — ĉefe la kamparan-laboristan klason frapis per labormanko, per mizero. Tiuj homoj revis plibonigi sian vivon en la evoluanta Nord-Ameriko kaj forlasinte la patrolandon — traŝipadis la oceanon, En ĉi tiu artikolo mi ne volas paroli pri homoj, kiuj por oro, por riĉeco iris al Ameriko, nur pri tiuj, kiuj la ĉiutagan panon volis akiri per la laborebleco . . .*

*En la 19. jarcento inter la enmigrintoj estis la grupoj de la diversaj religiaj sektoj, kiuj kreis — laŭ la prakristana kaj utopista ideoj — ekonomiajn komunumojn. Bölöni Farkas Sándor, hungara scienculo travojaĝante Amerikon en la jaro 1831 vizitis la menciitajn komunumojn — interalie ankaŭ la Rapp-komunumon en Economy—, kaj multfoje trovis hungarojn en la baptista, ŝekera, mormona kaj jehovista kolonioj. Bedaŭrinde, mi ne trovis indikojn pri ilia sorto en la sekva tempo. Sed, hungara ĵurnalisto antaŭ kelkaj jaroj trovis en Ontario proksime al Kitchener la farmon de Prakristana Frateco, kies anoj post la unua mondmilito forlasis Hungarion, kaj post mizera komenco, hodiaŭ ili havas bone prosperantan farmon, vivas en ekonomia komuneco kaj la infanoj lernas en la lernejo: hungare!*

*En la dua parto de la 19-a jarcento, post la malvenko de la hungara liberbatalo, miloj da revoluciuloj fariĝis elmigrintoj — multaj el ili migris al Ameriko. En la amerika sklavliberiga batalo partoprenis ĉ 1600 hungaroj. En la kupolo-halo de Capitolium en Washington estas videbla la memoriga fresko pri la liberigo de Springfild en Missouri, 1861 (25. Okt.) — pere de hungaraj husaroj, kies gvidanto estis majoro Zágonyi. Post la abdiko de Frémont ankaŭ Zágonyi Károly pensiiĝis kaj estis prezidanto de la New-York-a Hungara Asocio. En la jaro 1867 li planis la hejmenvenon al Hungario, sed tiutempe li perdis sian tutan havaĵon, kaj ekde tiam lia sorto estas nekonata . . .*

*Komence de la 20-a jarcento rapide altiĝis la nombro de la elmigrintoj kaj en la tempo inter la du mondmilitoj atingis la 1,5 milionojn. Plejparte ili nur tial traŝipadis la oceanon, ke kolektinte sufiĉan monon, ili povu hejmenveni kaj aĉeti bieneton aŭ propran metiejon . . . aŭ per la mono ili povu nutri la familion ĝis eblas trovi laboron . . . Tiuj homoj laŭvorte „vendis sin" jam antaŭ la foriro al la agentoj, kaj en Ameriko dum jaroj ili fariĝis viktimoj de ĉi tiuj agentoj. Tiutempe la ĵurnalisto Pásztor Árpád sekvis grupon da elmigrintoj de Hungario ĝis Ameriko — li vojaĝis kun ili sur la interferdeko de Pennsylvania: kiel en la infero! Li skribis raportojn pri tiu preskaŭ neeltenebla vojaĝo, kaj pri la vivo de la hungaraj kolonioj en la Nova-Mondo. „Ĉiu fantazio estas malforta por imagi la teruran realon" — pri la vivo de la unua generacio de la enmigrintoj, por ekzemplo menciinte la fabrikurbon Mc Keesport, kies stratoj estis nigraj pro la karbo-fumo, kies mizera rando estis hejmo de la enmigrintoj: ĉiu nacio havis aparton straton el lignodomoj.*

*La separiĝo estis komprenebla: ĉiuj nur la gepatran lingvon konas . . . Pro la manko de la lingvoscio, ili ne komprenis la angle parolantan laboriganton, kiu ĵetis la elliverulojn kontraŭ la strikoj en la fabriko kiel strikorompantojn, kontraŭ la pafilojn de la sindefendantaj tieaj laboristoj . . . tiel perdis la piedon (kaj la laboron) Kis Rafael — kies nomon menciis la ĵurnalisto. Sed ne nur ĉe la bordo de Monongahela estis tia la vivo — same estis en la infero de Carnegie, en Pennsylvania (kies ĉiohava sinjoro estis Carnegie), „tie akceptas la hungaroj tian laboron, kian nenia popolo de la mondo volas akcepti . . ." skribis Pásztor Árpád.*

*La dua generacio jam ellernis la anglan lingvon, perdis la timon pro la fremdeco de la nova socio, sed — ankoraŭ ne enradikiĝis, kvankam jam perdis la radikon ankaŭ en la iama patrolando. La tragika dua generacio pro la klopodo por la asimilado, de tempo al tempo malproksimiĝis de la hungaraj tradicioj, kaj la tria generacio grandparte nur en la angla lingvo legas jam pri Hungario . . . La granda amerika socio enfandis ilin laŭ sia propra vivmaniero, laŭ sia propra karaktero.*

*Tamen — mi volus memorigi la karajn legantojn pri la hungara laborista ĥoro en Cleveland, kies 60-jaran jubileon ni salutis en la 1-a nr. 1969 de Hungara Vivo . . . Jes, malgraŭ ĉio, ne pereis la hungaraj kolonioj kaj ne ĉesis la memoro pri la hungara kulturo — precipe la tria, nuna generacio montras kreskantan intereson pri la pra-patrolando. Tion pruvas ankaŭ la altiĝanta nombro de la hungardevenaj turistoj el Ameriko al Hungario — estu ĉiuj ame salutataj!*

# Revuo de revuoj

Mi daŭrigas do mian revuadon pri nia revuaro en la espero, ke ĝi tamen fine vekos resonon ie. Eĉ malfavora resono estus salutinda kiel okazo de diskuto, ege necesa por ke ni ne fariĝu Oscedanta Esperantujo.

En la 2-a numero de NORDA PRISMO min ĝojigis „Lingvaj figuroj en Esperanto" de *Reto Rossetti* ne nur pro ĝia valora enhavo, sed ankaŭ kiel signo pri la literatura revigliĝo de la aŭtoro; ĉi samon mi salutis ankaŭ en *Heroldo de Esperanto* (intervjuo kun Marjorie Boulton). Mi ĝojis, ke de *W. Auld* ni havas la tradukon de la fama poemo „Hipopotamo" de *T. S. Eliot*, kaj mi plezurigis min per la originalaj poemoj de *W. Auld*, kiu ŝajne pli kaj pli forpuŝas de si la eksterajn influojn (Eliot, Ezra Pound, Cummings) kaj kantas per sia propra voĉo. Espereble, li ne lasos sin terori de la konkretpoeziistoj. Neelĉerpebla estas la poemtraduka abundokorno de *H. Dresen*. Certa aŭtoro sub liternomo EAH indignas pri tio, ke laŭ la poetiko de Waringhien en la „Parnasa" la ĝermana metriko estas „fremda metriko" en E-o, kaj li aldonas, ke nia poezio apenaŭ trapasis sian pioniran periodon, ĉar „ĉu ĝi jam havis sian Dante, sian Shakespeare, sian Goethe?" Nu, ĝi jam havas ilin, se ne en originalo, almenaŭ en formfidelaj tradukoj, kaj, el metrika vidpunkto, tio estas ja la sama afero. — La 3—4-a numero enhavas multajn interesajn prozaĵojn tradukitajn kaj originalajn; pri ili mi ne parolos, ĉar ili, prezentante agrablan legaĵon, parolas por si mem. Tre interesa estas la numero el poezia vidpunkto: kvazaŭ defilas en ĝi la plej diversaj direktoj ekde *Victor Hugo* tra *Igor Severjanin* ĝis *P. Thorsen*, *Mira Andrusiewicz*, *E. de Kock*, *N. de Seabra* kaj *B. Ragnarsson*. Mankas *Nogueira*, doninta fragmentojn en la 2-a numero, sed jam tie malfidela al sia idealo, la „konkreta" aŭ „vorta" poezio. La duan fragmenton mi eĉ senmanke komprenis kaj tion jene kvitancas. *N. de Seabra* estas nova kaj brilema stelo: en liaj poemoj eĉ romantika urso povus trovi kelkan mielon. Bedaŭrinde, li sentas necesa doni tro multajn komentojn, kaj tiamaniere lia poezio aspektas, kvazaŭ oni legus solvitan krucvort-enigmon.

En la 2-a numero de SENNACIULO surprizas la artikolo „Socialismo en nia epoko", kompilita de Petro mem kaj presita frontpaĝe, do ŝajne ia oficiala asocia manifestaĵo. Por montri el parto la tuton, jen citaĵo: „La kapitalismo degeneradis, la socialismo reviziis sin, la komunismo kompromitis sin". La ĉefa postulato ĉe traktato stas difini la terminojn uzatajn; „socialismo" ekz-e estas la plej bunte misuzita termino, kiun signas la S-litero en la nomo de CSU de Strauss kaj eĉ de la NSDAP de Hitler; ĉu ili estas la reviziintoj? Nu, tamen ne, temas ankaŭ pri Bernstein, do la revizio signifas, ke la laboristaro povas kaj devas realigi siajn esperojn interne de la kapitalismo. Jes, sed kiel fari tion, se la kapitalismo mem degeneradas? Ĉi tiun kontraŭdiron Petro forgesas solvi. Krome, la komunismo ne povis sin kompromiti, ĉar — kiel tion scias ĉe ni ĉiu dekaĝulo — ĝi ankoraŭ nenie efektiviĝis. Aŭ la termino estas uzata laŭ Mr. Hoover? Ho, tiuj terminoj! Oni povas legi ankaŭ pri la „libera mondo" kun ties alta vivnivelo, sed Petro ne diras, ĉu pluraj landoj de Latina Ameriko, la malsatantaj popoloj kaŭzantaj tiom da zorgo al WHO kaj la „strategiaj vilaĝoj" en Sud-Vjetnamio apartenas al tiu „libera mondo".

AŬSTRIA ESPERANTO-REVUO meritas ĉi-jare specialan atenton, ĉar ĝi aperas en la kongres-lando. Ĝi elstaras per sia delikata papero, sur kiu tre bone efikas la portretoj de la Alta Protektanto kaj LKK. La pluaj numeroj certe alportos multon interesan.

TEJO-NOVAĴOJ sciigas pri multaj diversaj sukcesoj de E-o inter la junularo. En Slavsko, Karpata Montaro, belsukcesa junalara tendaro de sovetaj e-istoj „starigis la junularan movadon sur pli altan organizan ŝtupon." En la Monda Skolta Ĵamboreo en Tokio (1971) espereble E-o estos el la oficialaj lingvoj. En Usono, en „Congressional Record" aperis parlamenta protokolo, kiu raportas pri la utiligo de E-o fare de aliaj registaroj kaj emfazas la mankon de tia utiligo fare de la Usona registaro. Tre verva alvoko fermas la gazeton el la plumo de *Hans Bakker:* ĉiuj sub kaj super 25 jaroj helpu TEJO-n per patrona membreco je floranta, vigla mondfaceta mondmovado!

La sveda LA ESPERO (Nro 1—2.) estas riĉenhava. Mi kore salutis en ĝi la poemon de *F. R. Banham*, bedaŭrante, ke tiel malmulte legeblas de li niakontinente. Ame ni adiaŭas la malnovan redaktoron *T. Morariu* kaj salutas la novan: *Åke Blomberg*. Interesa estas la prilingva noto de *V. Setälä;* ni informas lin, ke Török tial estas skribata Thewrewk, ĉar iam antaŭ jarcentoj tia estis la ortografio kaj la nomo restis en tia formo tra la sinsekvaj matrikuloj.

**L. Tárkony**

---

*Universala Esperanto-Asocio havis pli da membroj en 1969, ol iam antaŭe, kun la sola escepto de 1963. Tamen ofte venas malfrue membro-kotizoj — eĉ en la posta jaro — kaj ankoraŭ povas esti, ke la Asocio superis eĉ la jaron 1963. La suma nombro de membroj, individuaj membroj kaj asociaj membroj kune, je la 31a de decembro 1969 estis 33 407. Membroj de tiuj landaj Esperanto-asocioj, kiuj aliĝis al UEA (nuntempe ili estas 30) estas asociaj membroj de UEA kaj rajtas uzi ĉiujn servojn de la Asocio, inkluzive la delegitan reton. En 1969 kreskis la nombro de asociaj membroj precipe en Aŭstralio, Danujo, Hungarujo, Italujo, Polujo kaj Usono. La nombro de individuaj membroj restis konstanta.*

*Károly Jobbágy*

# CÉGÉNYDÁNYÁD

Iras-venas la leteroj sur la poŝtovojoj de la mondo, kiel misteraj, fikstempigitaj bombetoj, raketoj de la ĝojo aŭ de la tristo, kaj eksplodante nur ĉe la malfermo de la kovrilo, ili forhuŝas la triston ĝis tiam ĉioplenigan, aŭ mallumigas la brilon de la ĝojo. Kelkfoje ili vekas strangajn sentojn de hazardaj renkontiĝoj: al la demando de iu letero la alia donas respondon.

Tiel okazis ankaŭ al mi en la pasintaj tagoj.

El eksterlando portis la poŝto leteron, de mia bona amiko, iama samklasano, vivanta nun en Munkeno. Li raportis pri siaj etaj ĝojoj, pri sia malfrusomera vojaĝo al Romo, pri sia vivo. Sed el la letero elfalis ankaŭ ĵurnalfolio, pri kiu li mem eĉ ne skribis, li ĝin dediĉis al mi nur kiel etan ĝentilaĵon: folio de la numero de la 23-a de aŭgusto 1969 de la revuo „Dél-amerikai Magyarság" (Sudamerika Hungararo), kaj sur ĝi estis mia poemo „Cégénydányád".

Dio mia! „Cégénydányád". Mi ĝin verkis antaŭ dektri, preskaŭ dekkvar jaroj en januaro 1956.

La titolo de la poemo estas nomo de malgranda vilaĝo de la departemento Szabolcs, kiu sin kaŝas trans Mátészalka, en la distrikto de Fehérgyarmat, inter siaj najbaroj kun nomo same malofte aŭdata. Kiam, en tiuj jaroj, parencaj fadenoj min gvidis tien, mi sentis, ke mi venis al la fino de la mondo. Se frumatene mi ekiris el Peŝt, iĝis jam vespero, kiam en la mezo de la vilaĝeto, post transtrajniĝoj, mi lace forlasis la aŭtobuson. Elektro ne estis en la vilaĝeto, tiel do ankaŭ radio aŭdiĝis nur en malmultaj lokoj, la kooperativo faris siajn unuajn paŝojn, ĉie flagris malkontento, amaro . . .

Sur tiu ĉi marĉo de la pasioj mi preskaŭ sentis rimorson pro tio, ke mi vivas en la lumo de la ĉefurbo kaj mi skribis en poemo la malesperiĝon de tiea homo, kiu en tiu forlasita angulo, en landparto forgesita de ĉiu, jene ekkrias:

*Ne parolu al mi*
*pri la kosmaj ŝipoj,*
*pri la vojaĝo al la Luno*
*kaj al la Marso,*
*. . . kaj ke ni vivas en la mondo*
*de la atomo . . .*

kaj fluis el mi la plendo, la retorika indigno pro la vivo sen kuracisto kaj sen lumo. Tiu imagita tiea samepokano, post kiam li ĉion akuze jam frapis al miaj okuloj, ankoraŭ elĵetis, per tio finante la atakon de ondoj:

*Ne klarigu, ke en Afriko*
*estas pli malbone!*
*Mi vivas en Eŭropo,*
*kun blanka haŭto,*
*kiu min do brakumos, ke ankaŭ mi*
*fariĝu homo? . . .*

Kiam ĉi tiun poemon mi verkis, vivis ankoraŭ en miaj nervoj, ke decas altajli ian optimisman finon, sed jam estis tiu epoko, kiam la alia duono de mia konscio povis alkrii min: altajlu tian la vivo! do jene mi finis la poemon:

*Mi diris nenion.*
*Kial diskuti?*
*Kial mi diru, ke*
*„vi vidos ĝin, future" . . .*
*Mi lin nur brakumis*
*anstataŭ ni ĉiuj.*

La poemo aperis en la revuo „Csillag" (Stelo) kaj havis grandan eĥon. Kiam ankoraŭ en la sama jaro mi estis en Mátészalka en oficiala renkontiĝo de verkistoj kaj legantoj, troviĝis inter miaj aŭskultantoj kamparano, kiu 15 kilometrojn faris sur biciklo, nur por vidi min, „tiun, kiu tiel priverkis nian vivon" — li diris.

La poeto volus verki tiajn poemojn, kies vereco estas eterna, kies krediton ne nuligos la tempo. Ĉe tiu ĉi poemo mi rekonis, ke estas danĝere konfidi al la flugiloj de la poezio cirkonstancojn rapide ŝanĝeblajn. Pasis kelkaj jaroj kaj ĝia kredito komencis kraki-knari, ĉar la iama streĉo forĉesis sekve de la evoluo. Venis sciigoj, kaj ankaŭ mi iradis tie poste: estiĝis elektra lumo, pli bona vojo, pli bona vivo, kaj iom post iom tiu ĉi poemo iĝis unu el la memoraĵoj de mia ŝanĝivola, publikvivema, flagranta paseo.

Tial mi rigardis ĝin mire nun, kaj mi povis ĝoji pro ĝia denova apero,: en la sekva minuto ĝi min jam tristigis. Nun, presigita sen la dato de la verkado, ĝi *mensogas* ja, kaj precipe en la alia duonparto de la mondo. Ĝi kredigas al sensuspektaj legantoj, ke ĉio ĉi estas *nun*, ke *nun* mi indignas pro la mallumo.

Tio estis ĵaŭde vespere, kaj pro stranga hazardo, vendrede alvenis nova letero, nun el la departementa biblioteko de Nyíregyháza, en kiu oni sciigis min en akompano de afablaj, amikaj vortoj, ke dimanĉe posttagmeze oni atendas min en Cégénydányád por renkontiĝo inter verkisto kaj legantoj.

Surprizite mi turnadis la leteron en mia mano. Se ankoraŭ vivus en mi la kredo de mia infanaĝo, mi dirus, ke ia supera potenco direktis tiel la intencojn, sendas min nun tien: Rigardu per la propraj okuloj, *kiom ŝanĝiĝis la mondo!*

Mi ne priskribas longe, ĉiu povas imagi, kion mi trovis. Estus skemeca lakado entuziasmiĝi pri tio, kio estas ja natura. Pri la elektra lumo, pri la bona vojo kondukanta en la vilaĝon, pri la amaso de la radio-aparatoj . . . Pri tio, ke antaŭ sepdek televid-aparatoj la homoj sidas vespere, sed je la fino de la jaro jam estos da ili cent — diris la direktoro de la lernejo (ankaŭ li mem estas elstara poeto, gajninta premion en literatura konkurso), pri la kvardek kvar forintoj planitaj por la laborunuo en la agrokultura kooperativo, kaj pri tio, ke je mia demando: Kiom da aŭtoj troviĝas en la vilaĝo? — jen estis la respondo: Unu, sed se sub la kusenoj ni rigardus, kiom da mono tie troviĝas, oni povus aĉeti ankoraŭ cent!

Estas ja, kio ne ŝanĝiĝis. Cégénydányád ankaŭ nun estas tiel same malproksime, eĉ pli malproksime ol

antaŭ dekkvar jaroj. Tiam ni ankoraŭ ne konis la rapidecon de la kosmoŝipoj. Kiu ekiras matene, ankaŭ nun povas nur vespere atingi tien, dumtempe sur stacioj li pasigas side sian tempon.

Tamen min kaptis emocio, kiam mi paŝis en la kulturdomon, kiu konstruiĝis de tiam, kvankam mi povus esti ankaŭ ĉagrenita. Kiam mi volis iri internen, mi ne havis lokon pro la amaso staranta antaŭ mi. En la duonobskuro krepuskis la blua lumo de la televido kaj pluraj min rigardis nervoze: sur la bildekrano brilis la bildoj de la Usona ludfilmserio de Zorro.

— Ho, ekskuzon! Ni ne kalkulis pri tio... Pro tio ni komencos iom pli poste — diris la bibliotekisto, kaj, disetendante la manojn, flustre li invitis min al malgranda biblioteko. — Ili estas nia publiko, sed ili ne volas preterlasi tiun ĉi parton de la serio — daŭrigis mia gastiganto, kaj mi gaje mangestis, ĉar eĉ preter siaj danĝeroj en tio vibris ja la ŝanĝa forto de la epoko. Poste, post kvaronhoro, ni jam estis supre — ankaŭ pri tio mi amuziĝis — sur la scenejo, jes, kaj preleganto kaj aŭskultantoj, tie ni plenŝtopiĝis. Ĉar tiel multope ni ne estis, ke ni plenigu la grandan ĉambregon, sed tamen ni kolektiĝis tiom, ke eĉ sur tiu granda scenejo ni havis lokon nur tiamaniere, ke multaj nur staris, kaj la junuloj staradis ankaŭ post la kurteno kaj aŭskultis, kiel nun denove forsonas la versoj de „Cégénydányád" kun la kontenta klarigo akompana: *De tie ni ekiris, el tia malsupro!*

Tia amo min ĉirkaŭprenis ankaŭ pro tiu malnova poemo, je kio estas bone rememori kaj kiun detaligi estus fanfaronado.

Prefere mi rakontas nur la adiaŭadon kiel karakterizan epizodon.

— Onklo Karlo! Ni metus kelkajn pomojn en vian saketon, por la vojaĝo — diras al mi iu juna amiko. Iom konfuzite mi konfesas, ke mi havas ĉe mi falditan mansakon: iom mi kalkulis pri tio, ke el la patrujo de la pomo mi ne foriros tiel, ke mi ne forportu el ĝi kilogramon. — Estas tre bone! — ili krias, almenaŭ vi portos specimenon el tio, kion ni al vi dediĉis, la tuton vi ne povas ja forporti. — Kiom? Ni pensis keston da pomo, ke vi ne forgesu nin... Ne havu zorgon pri tio, nur donu vian adreson...

Jen la riĉa Cégénydányád. Ankaŭ tion ili jam povas fari. Kaj vere, post kelkaj tagoj alvenis la kara sendaĵo. Nian loĝejon plenigas la mirinda odoro de la pomo kaj elvokas en mi tiun karan pejzaĝon kaj tiun kontentecon, ke por fini la iam tristan poemon tamen la vivo altajlis bonan finon.

Nu jes! Sed kiu tion presigos en la „Sud-amerika Hungararo"?

Tradukis: **Lajos Tárkony**


La gantfabriko de Pécs, en centro de Eŭropo estas unu el la plej grandaj ledogant-entreprenoj de la mondo. Ĝia jara produkto superas la 2,5 milionojn da paroj. La fabriko eksportas siajn produktaĵojn en plurajn landojn de Eŭropo, Azio, Nord-Ameriko, plue en Aŭstralion kaj en Nov-Zelandon.




EKSPORTO-ENTREPRENO HUNGARIO

TANNIMPEX
BUDAPEST, VI., VÖRÖSMARTY U. 35.

SÁNDOR WEÖRES

# EL "ORBIS PICTUS"

## LA VIVANTA SPEĜULO

Vizaĝon vian levu, mi vidu, ke en okulo
spegulas sin fenestro kaj floroj kaj ĉielo
kaj ankaŭ mi mem, ne pli granda ol eta kulo:
la tuta mondo naĝas en ŝelo de avelo.

## LA MIRAKLO KAJ ĜIA VIDANTO

Rajdantoj nudaj hastas fluge tra l'ĉiel-bluo,
la rano vidas tion, saltadas kaj ekkvakas:
„Ho vi, vizio mia ! Mia individuo !
Ho vi, genio mia, ke tian mi imagas !"

## DRAMATIS PERSONAE

Dum viro-fort' vi estas, skerma kun la destino,
la tuta kreo al vi palac' promena estas.
Dum vi portanta ŝtormon, sunbrilon 'stas virino,
la univers' per onda nupt-robo vin survestas.

## LA NENIO

1.

Ĉirkaŭas min ĉielo dezerta, globo blua,
nenie tera grundo, nur ŝnur' streĉiĝas rekte,
mi sur ĝi grimpis, falis; tra l'spaca faŭk' vakua
mi nun en plena solo falegas sendirekte.

2.

Jen kantas kavo, kantas tra lanternara lumo,
malantaŭ stratoj ie kanto de kavo ondas,
ĉion videblan dorse, en sankta frenezumo,
al la ne estiĝintaj estaĵoj ĝi respondas.

3.

En sonĝ' vi petis groŝon, sed mi rifuzis doni.
Mi revekiĝis, scias, ke vivis vi neniam,
jam donus ormoneron, jes, kial ne rekoni?
Sed vi tro rapidege galopas vojon vian.

## KONCIPIĜO

Urbe virinoj, viroj amuziĝante bruis,
mi kiel sonĝovolvo flugis en sfer' supera.
Varma vapor' ilia min tiris, sin algluis,
tiel mi iĝis ido de l'ter', kaptit' utera.

## NASKIĜO

Fenestro ruĝas en la minutoj infan-naskaj,
iu trans ekzist-bordo mortis, kaj ni jam aŭdas,
ke li ĉi tie ŝrikas, kaj riveretoj vaksaj
de la funebro kaj de l'teruro lin postplaŭdas.

## LA TRETANTA PLANDO

„Ne estas dio — diras la hom' en la skorio —
nur ŝanĝiĝanta esto, la ĉirkaŭ mi flagranta."
Kaj lin la ŝanĝ' surtretas: „Jes, pravas vi en tio,
tremegu de mi, nano, mi estas la giganta."

## BANEJO KAJ TOMBARO

En la banej' marmora, bluet-vapora varmo
interpremiĝas nude roznuancaj karnoj multaj,
kaj la iamaj gastoj, jam nudaj eĉ de karno,
en friska suk' de l'tero kuŝadas kuntumultaj.

## LA FREMDA AMATINO

Neniam ni kunestis, neniam ni nin vidis,
ŝtoniĝu do en kanton la hont' kaj tristo ronĝa;
ni unu en l'alian sinki en sonĝ' avidis,
fileto generiĝis el nia nupto sonĝa.

## LA POETO

En vivo mi, leporo, vagas tra step' sterila,
malsat' bestia pelas, pafilo min minacas,
en mia verk' mi vivas, rufa leon' flugila,
ĝis venk' mi por vi luktas, neniam vin forlasas.

Tr. **K. Kalocsay**

*Sándor Weöres* (1913— ) poeto, tradukartisto, filozofia doktoro, estas elstarulo de la nuna hungara liriko kun la escepta esprimivo, riĉfonta fantazio, elementa vidiga forto kaj ritma virtuozeco de sia poezio. Lia filozofio estas la enfermiĝemo, lia mondo estas panteisma. Ŝato de mondo de imago lin impulsas krei mitojn. Lia voĉo estas de tre larĝa gamo, ekde pene komprenebla abstraktismo kaj liberasocia stilo tra filozofia kaj priskriba ekzakteco ĝis fee facila ludemo kaj freŝa porinfana versbabilo. La tradukitaj poemoj estas specimenoj el lia 100-poema ciklo „Orbis pictus".

(„Orbis pictus" t. e. pentrita mondo estas ofte uzita titolo de porinfanaj teksto-havaj bildo-libroj. La titolon Amos Comenius uzis la unua (1658) por sia fama lernolibro, kies celo estis instrui per observebligo de la aĵoj.)

*Béla Stettner: Krio (Monotipio)*

# *Hungario kaj Unesco*

Hungario estas membro de UNESCO jam de 20 jaroj kaj ekde 1954 partoprenas ankaŭ aktive en la laboro de ĉi tiu grava internacia scienca kaj kultura organizaĵo. Kiel en la 125 membroŝtatoj, ankaŭ ĉe ni funkcias nacia komitato, kiu mem elektas por si prezidanton kaj vicprezidantojn, kaj kies membrojn la prezidanto de la Instituto de Kulturaj Interrilatoj petas por partopreno.

Ni partoprenas en la dekjara evoluiga programo de UN, kaj tiel, ke ni ne ricevas, sed donas. Ekspertojn ni donas. En 1969 *dudek kvar hungaraj ekspertoj laboris sume dum 200 monatoj en 17 landoj de Afriko, Azio kaj Latina Ameriko.* Jen kelkaj karakterizaj ekzemploj pri ilia laboro: la fizikisto *György Marx* funkciis en Pakistano kiel konsultato, akademiano *Zoltán Szabó* estis tiel same konsultato en Damasko. *Kálmán Borsányi*, historiisto, kiu antaŭe restadis en Malio, antaŭjare instruis la historion de Afriko en *Addis Abeba.* La inĝeniero *András Makádi* instruis kvar jarojn en la Universitato de Damasko; kiam li revenis de tie, dekunu el liaj iamaj Siriaj disĉiploj venis post lin en Hungarion por studvojaĝo. *Dr. Alfréd Temesi* iris la duan fojon en la Malgaŝan Respublikon; li metis tie la fundamentojn de la pedagog-edukado. Estas menciinde, ke antaŭ li nur sola hungaro restadis en tiu insulo: grafo Maŭrico Benyovszky, kiun en 1776 oni elektis reĝo en la tiama Madagaskaro; lian memoron gardas tie nomo de strato.

Sub la egido de UNESCO ni estigis fekundajn kontaktojn kun la skandinavaj landoj: ni subskribis programojn, laborplanojn. Same bonajn interrilatojn ni havas, pere de UNESCO, kun Hindujo, Araba Unuigita Respubliko, Italio, Nederlando, Franclando, Svislando. Kun Franclando, krom la plenumo de la kulturaj laborplanoj, ni efektivigis la interŝanĝon de 400 francaj kaj hungaraj studentoj kaj pedagogoj. (Laŭ *Sándor Maller*, ĉefsekretario de la Hungara Unesko-Komitato).

---

# RECENZO

ANH DUK: HON DAT. Romano. Sudvjetnama literatura kaj arta premio Ngujeb Dinh Chieu- 1960—1965. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1968. Tradukis Ngujen Minh Kinh kunlabore de Ngujen Minh Tung kaj Ngo Quy Toan. 447 pp.

Hon Dat estas vilaĝo Sud-Vjetnamia, kies loĝantaro, krom kelkaj perfiduloj, tutanime kaj sindone subtenas la liberbatalantojn. En 1965, sub gvido de fanatika murdisto kaj antipopolulo, mil malamikaj soldatoj invadas la lokon, por ekstermi la liberbatalantojn kaj submeti la vilaĝon al la malamata reakcia reĝimo. La liberbatalantoj, sume 19, inter ili tri knaboj kaj du virinoj, retiriĝas en subterajn fortikigitajn kavernojn. Dek tagojn daŭras la batalo, kaj tiuj tagoj estas plenaj de intereskaptaj okazaĵoj, de ĉiam novaj trovaĵoj kaj taktikaj fintoj, per kiu la deknaŭo povas rebati la atakojn de milo kaj fine rekonigi al ili la senperspektivecon de ilia entrepreno. La antaŭparolo mencias kelkajn mankojn de la libro el severe literatura vidpunkto, sed la temo mem estas tiel ekscita kaj animskua, tiel plena de surprizaj turnoj ke tiuj makuloj eĉ ne rimarkeblas. Ĝojemocia estas la fino, kiam la vilaĝanoj kaj la amataj liberbatalantoj retrovas unu la alian.

La lingvo de la traduko estas simpla, bona; kelkfoje sentiĝas malcerteco pri la uzo de modoj, sed ne ĝene. Anstataŭ *onĉjo, onnjo* ŝajnas prefereblaj la jam ofte uzataj *oĉjo, onjo.* Memorinda libro!

**L. T.**

# El la inventaĵoj de dudek kvin jaroj

En la pasinta kvaron-jarcento pli ol 12 mil hungaraj patentoj helpis la teknikan progreson de la industrio. Nur kelkajn el la plej interesaj ni povas prezenti pro manko de loko.

La *rulplugilo*, inventita de *István Szabó*, modifas la 5000-jaran metodon de la plugado. Laŭ ĝi, ĉe la plugilo aŭ aliaj terkulturaj maŝinoj, la glitfroto estas anstataŭigata per ruliĝfroto. Estas konate, ke ĉe ruliĝo la fizika rezisto estas multe malpli ol ĉe glito; pro tio la nova plugilo, kun siaj ruliĝantaj konusoj, ŝparas ĉe la traktoro, kompare al la malnova, materialon de 30—60%, laŭ la terospeco. Alidire, la laborprodukto de la rulplugilo estas 30—60%-ojn pli granda. Oni sukcesis fari per ĝi ankaŭ rapidplugadon. Ne mirinde do, ke aĉetintoj en- kaj eksterlandaj mencias ĝin laŭdege kaj grandaj firmoj intencas aĉeti ĝian licencon.

La *traŭmatologia operacia tablo* estas konstruita de kirurgo-traŭmatologo *Ferenc Oberna* baze de plurjardekaj traŭmatologiaj spertoj. La fabriko *Medicor* jam produktas tutajn seriojn el tiu multflanka kirurgiilo, ebliganta, ke oni povu sin okupi pri la vundito en ties plej oportunaj kaj sekuraj pozicioj, eĉ se ĉiuj kvar membroj estas rompitaj. Pro siaj vastaj avantaĝoj la tablo estas uzata multlande en operaciejoj.

La licenco de la *sensplita segilo*, inventaĵo de *Ferenc Veress*, estas jam aĉetita por multaj Eŭropaj ŝtatoj. Per ĝi oni povas segi sensplite la valorajn metalstangojn, dratojn aŭ profilojn.

Malfacilega, ofte eĉ nesolvebla tasko estas *ellevi dronintajn ŝipojn;* tutmonde oni serĉas por tio konvenajn metodojn. La inventaĵo ĉi-koncerna de *László Szaskó* plene pruvis sian bonan taŭgecon. Laŭ la sprita metodo oni alligas tenujojn plenajn de akvo kaj poste en la tenujoj oni elektrolizas la akvon. La levoforto de la estiĝintaj gasoj levas supren ian ajn ŝipojn de sur la marfundo.

**Tr. E. Fenyvesi**

# MEDICOR

## produktas kaj eksportas:

instalaĵojn por rentgeno-diagnozo kaj radio-terapio, medicinajn elektrajn kaj elektronajn aparatojn por diagnozado kaj por kuracado, dormigajn aparatojn, instalaĵojn por operaciejoj kaj por malsanul-ĉambroj, sanitarajn veturilojn, medicinajn kaj veterinarajn insrumentojn, sanitarajn amasartiklojn, unufoje uzeblajn sterilajn ilojn. Kompletaj sanitaraj unuoj estas projektataj kaj liverataj. Informado kaj konsilado en hospital projektaj-organizaj aferoj.

Medicor Verkoj Budapeŝt

**MEDICOR**

MEDICOR BUDAPEST

# TEATRA KRONIKO

*„ĈAPITROJ PRI LENIN" estas la titolo de la „dokumenta oratorio" de László Gyurkó; ĝin prezentis la Nacia Teatro en Budapeŝto, la 22-an de aprilo 1970. La aŭtoro diris pri sia kreaĵo: „Per mia dokumenta oratorio mi ne intencis doni ian transversan sekcon aŭ valorjuĝon pri la vivo kaj vivoverko de Lenin . . . La teatro estas oratora podio kaj ne lerneja katedro: ĝi parolas al la nuno kaj ne la paseon ĝi konigas . . . Mia celo estis elserĉi tiujn trajtojn de la plej granda, historioformanta personeco niaepoka, kiuj nun estas por ni plej instruaj. Mi povus diri ankaŭ tion, ke la dramo parolas ne pri Lenin, sed pri la lenina problem-komplekso." La reĝisoro, Endre Márton eksplikis, ke la prezentaĵo estas, en ĉiu sia vorto, aŭtentika dokumento: sur la teatro ekparolas la leteroj kaj taglibraj paĝoj de Lenin kaj de liaj kunlaborantoj. En la lasta, kvara ĉapitro, ekz-e, koniĝas al ni per la korespondado de Lenin kaj Gorkij la interrilato kaj amikeco de tiuj du gigantoj. La verko, ĉar, oni prezentas ĝin en teatro, devas manifestiĝi kiel dramo, en la interpuŝiĝo de argumentoj kaj kontraŭargumentoj. La tasko estis: reveki la Leninan problemon en la cerbo kaj sentoj de la nuntempuloj. La aktoroj ne diras ĉiu unu saman rolon: ilia ensemblo travivas kaj pluportas la Leninan penson. Sed ili ne formas ian deklaman ĥoron: oni imagu ilin, kiel perfektan ĉambran orkestron, kies ĉiu membro estas solo-artisto; en ĉiu situacio ili ekparolas alimaniere. Kulisoj ne ekzistas, sed ofte aperas bildoj projekciitaj sur ekrano. Tamen, oni devis sin gardi de tio, ke la tekniko superregu kaj superkriu la penson.*

*

„FLUGU, PAVO!" — Sub ĉi tiu titolo — komencaj vortoj de malnova popolkanto — la hungara TV aranĝis konkurson pri prezento de *veraj* popolkantoj. Por kompreni tiun „vera", oni sciu, ke la plejparto de la hungaraj kantoj prezentataj de ciganaj orkestroj *ne* estas *veraj* popolkantoj, sed popoleskaj artkantoj. La verajn popolkantojn malkovris kaj kolektis precipe *Béla Bartók* kaj *Zoltán Kodály*. B. Bartók en sia libro „La hungara popolkanto" konstatis, ke ekzistas du ĉefaj tipoj de hungaraj kampulkantoj: 1. malnovstilaj, arkajaj kantoj karakterizataj interalie de pentatoneco (trovebla ankaŭ en la ĉina kaj japana muziko) aŭ de plagalaj (dorika, eola, friga), gamoj kaj de nearkitekteca strukturo de la melodiopartoj (ekz-e: A B C D); 2. novstilaj kantoj, estiĝintaj ekde la dua duono de la 19-a jarcento, karakterizataj de egalsilabeco kaj severe artitekteca strukturo de la melodio-partoj (ekz-e: A A B A aŭ A B B A) kaj oftaj pentatonaj melodio-turnoj. — *Ferenc Erdei*, ĉefsekretario de la Scienca Akademio, enkondukante la popolkantan konkurson, diris, ke tiuj kantoj ŝajne malaktualiĝis nuntempe: unue, ili parolas pri turmenta, laborjugita popolvivo jam feliĉe forpasinta; due, la nova vivo estas pli maltrankvila, pli nervoza ol la malnova, serĉas pli drastajn, pli ebriigajn efikojn: *beat*-muzikon. Tamen, estas eble kaj estas ankaŭ inde venki ĉi temp-obstaklojn, ĉar la popolkantoj estas veraj majstroverketoj kaj koncizege enkorpigas la historion, la tradicion, la natur-ligitan paseon, kiujn gardi apartenas al la esenco de la homa kulturo. Ĝuste nun, tempe de la pli kaj pli superreganta tekniko, estas tre necese malfermi fenestron al la naturo kaj historio. — La konkurson oni aranĝis tiel, ke ĝiajn antaŭfinalojn oni tenis en diversaj urboj de la provinco antaŭ plenŝtopitaj spektejoj. Kaj ĝi sukcesis kun surperiza triumfo: oni aŭskultis ĝin pli grand-nombre ol iun ajn alian TV-dissendon. La popolkantoj, kiujn oni jam enterigadis sub arkiva polvo, revivis freŝe kaj alloge. La spektantojn fascinis krom la beleco de la kantoj ankaŭ la pasia entuziasmo de la prezentantoj. En la prijuĝa voĉdonado la hejmaj spektantoj partoprenis per voĉoj proksimaj al miliono. Surprize estis, ke urbaj junuloj turnis sin al la plej arkajaj tavoloj de la folkloro kaj preparis sin helpe de diskoj gardantaj la voĉon de kampulkantantoj, kies melodiojn iam kolektis Bartók, Kodály, Lajtha kaj aliaj. Kaj ĉiu antaŭfinalo finiĝis per komuna kantado: kune kantis la konkursantoj, la ĵurio, la ĉeestanta publiko kaj tre probable granda nombro da hejmaj aŭskultantoj. Ĝi estis vere kolektiva travivaĵo!

*

LA THALIA-TEATRO de Budapest prezentis en la Urba Teatro de Helsinki la enscenigitan *Kalevala*, la nacian epopeon de la finna popolo. La finna gazeto „Helsingin Saomat" skribis pri tio: „Estus bone ĉi tiun Kalevala-interpreton ekkoni al ĉiu finno, kiu, parkeriginte la Kalevala-runojn lerneje, decidis meti nian epopeon en respektoplenan malproksimon disde sia intelekta interno pro ties dormiga efiko spertita". Jen citaĵo el „Uusi Suomi": „Mi ne memoras teatran prezentaĵon, kiu min tiom movus. Preninte la spektanton je mano, ĝi kondukis lin en solena, lanta, epika ritmo en mitan pramondon, kies ĉiu konata kaj forgesita sceno aspektis nova kaj freŝa, plena de vivo kaj humuro." La hungara reĝisoro, *Károly Kazimir*, jam prezentis la Kalevala-scenaron antaŭ unu jaro en Budapeŝto kun bela sukceso. La finnoj tiel plezuris pri la eltrovemo kaj riĉa fantazio, per kiu la verko — cetere de ne drama karaktero — viviĝis sur la scenejo „post forbalao de la polvo ĝin kovranta", ke ili invitis *Kazimir* reĝisori la draman prezentadon ankaŭ kun la aktoraro de la Urba Teatro de Helsinki, unu el la plej modernaj teatropalacoj de Eŭropo.

**A. K.**

# Juneco, juneco

## Beat-mesoj en la Matias-preĝejo

Interesa (kaj eble kurioza) problemo de la nuntempo estas, kiel uzi la modernan muzikon sur la scenejo de la plej konservativa muzika gusto: en la preĝejo. Kun miaj tiarilataj demandoj mi vizitis la muzikestron de la Matias-preĝejo. Li kompleze donis detalajn informojn.

La unuan hungarlandan beat-meson oni aranĝis en 1967, en Dunakeszi. En nia preĝejo, la unua tia junula meso estis la paskan dimanĉon de 1968. La interesiĝo de la junuloj estis tiel granda, ke parto el ili eĉ ne havis jam lokon por si en la preĝejo. Post tiaj spertoj la tempopunkton de la sekvantaj beat-mesoj ni anoncis nur en la preĝejo kaj nur unu semajnon antaŭe. Du tiaj mesoj okazis en 1968, kaj unu la unuan dimanĉon de 1969; ĉi-okaze ni prezentis la Kristnaskan meson.

— La interesiĝo montras, ke necesas senprokraste renovigi la religian muzikon, ĉar ĝi kvazaŭ neniom ŝanĝiĝis en la lastaj du jarcentoj kaj tiamaniere ne povas adekvate esprimi la dinamismon de la moderna homo. Ĉi tiun konflikton ni esperas solvi per la *beat*-mesoj, sed krome ni prezentos ĉi-jare unu t. n. *antibeat*-meson komponitan por bat-instrumentoj kaj ankaŭ mesojn de aliaj nuntempaj hungaraj komponistoj.

## Kalendaro

*Meze de aprilo oni aranĝis landan junularan kunvenon en Dunaújváros kun 200 partoprenantoj. KJA patronos la esperantistajn junularajn renkontiĝojn sekvantajn — okazontajn en ĉiu printempo kaj aŭtuno. Ankaŭ krom tio ĝi montris multajn signojn de helpemo.*

*En la Somera Universitato en Gyula — en julio — okazis la Dua Landa E-a Studkonkurso.*

*Inter la 17-a kaj 30-a de julio oni aranĝis la Internacian Balatonan E-an Ferion.*

## Pli granda aŭtonomio al la universitatoj

Blovas nova freŝa vento! Niaj universitatoj, por plenumi sian duoblan destinon, t. e. la fakul-edukadon kaj la sciencan esploradon, bezonas pli grandan aŭtonomion, novajn metodojn. La ĉi-rilata skizo de ŝtata dekreto jam aperis; nun kolektiĝas la alparoloj de la plej koncernataj personoj: de la studentoj.

Pluraj ŝanĝoj jam estis enkondukitaj. La nombro de la devigaj studohoroj malpliiĝis, ĉar la celo estas, ke la studentoj alproprigu per sia propra laboro la materialon. Por pliefikigi la ekzercojn, oni formas pli malgrandajn grupojn.

Povas okazi, ke la studentoj partoprenos kelkmonatan t. n. intensan lingvoinstruadon. La elstaraj rezultoj de tiu metodo faras ĝin pli kaj pli populara. Tiametode oni povas alproprigi etnan lingvon ne malpli rapide ol E-on per tuttaga okupiteco dum la kurso.

La laboron de la Universitataj kaj Fakultataj Konsilioj, t. e. de la direktantoj de la universitata vivo, partoprenas ankaŭ la reprezentantoj de la Komunista Junulara Asocio (KJA), elektitaj de la studentoj. Ankaŭ la aljuĝo de la stipendioj okazas baze de la opinioj de la studentoj. Tio estas bona el tiu vidpunkto, ke la studentoj konas la scion, stud-rezultojn, sintenon, aktivecon unu de la alia; tamen ne estis akceptita plenkonsente, pro timo de eventualaj misuzoj devenantaj el subjektiveco. Cetere la nova sistemo de stipendioj liberigas parton de la studentoj el sub la neceso serĉi aliajn enspez-eblaĵojn; tamen KJA plue zorgas por trovi kaj peri tiajn okaze de bezono.

Espereble ĉi tiuj aranĝoj efektive kontribuos al la kiel eble plej rezulthava atingo de la aspirataj celoj.

## Gitaraj trobadoroj

*Beat-muziko*, danckantoj! Kiu junulo ne legus kun intereso pri la hungaraj ensembloj?

Vekis certan surprizon, ke oni vendis en 1969 plej multe el la diskoj de la *Omega*-ensemblo: 354 mil pecojn. La teksto-verkistino de la orkestro, *Anna Adamis*, diris intervjuate: „Mi ne scias, kiel multaj rimarkis la pensojn malantaŭ miaj tekstoj, kiuj volas esprimi ion el la sentomondo de mia generacio, de la junuloj proksimume dudek jarojn aĝaj . . . Mi hontas nek pro la puraj sentoj, facile intermikseblaj kun sentimentaleco, nek pro la petola moketeco, sur kiun oni volonte gluas la vinjeton de cinikismo. Mi deziras fari furoraĵon el la *vero* de miaj kantoj".

La duan lokon akiris la *Illés*-ensemblo, pensata ĝis tiam la plej populara. Ili estis maltimaj pioniroj de la *beat*-muziko en Hungario kaj estas volonte aŭskultataj eĉ de multaj tiaj plenkreskuloj, kiuj cetere ne tre ŝatas la eksteran aspekton — kaj kelkfoje la sintenon — de la orkestranoj. Iliaj tekstoj ofte superas la ŝablonajn kantotekstojn. La renoma aktoro *László Mensáros* deklamis foje la kantotekston „Kiam mi estis ankoraŭ knabeto . . ." Estis bele.

Sen-gitara estas la tria lokito: *Tereza Harangozó*. Ŝia ĉarma, belkultura interpretado varbas por ŝi multajn ŝatantojn. Agrable ni spertis ŝian multflankecon, kiam en la Radio ni aŭdis de ŝi malnovajn, 17-jarcentajn „florkantojn" prezentatajn laŭstile.

La eksterlandan rekonon de la hungara leĝera muziko montras la invitoj, kaj tio, ke ankaŭ eksterlandaj orkestroj prezentas hungarajn kant-komponaĵojn. Oni tradukis du kantojn eĉ en la japanan lingvon.

Kompilis: János Tóth

D-ro István Szerdahelyi

# ESPERANTO KAJ LA MODERNA LINGVOSCIENCO

IV.

La nekono aŭ nur supraĵa kono de la problemo influis multajn elstarajn lingvistojn fari similajn konstatojn kiel la supre cititaj.

A. KONDRATOV en sia semiotika verko „La sonoj kaj la signoj" okupiĝas inter la interlingvaj problemoj iom pli detale pri Volapük kaj Esperanto (pp. 139—146). Li ne kritikas la lingvon, nur serĉas la kaŭzon de ĝia t. n. „malsukceso". „*Ne la lingvistikaj kialoj estas decidaj, sed la sociaj*", li deklaras. „*Gravas la socia neceso: . . . por ke la homoj sen ĝi ne povu interkompreniĝi, vivi normale kaj sukcese okupiĝi pri sia profesio" (p. 144) . . . Memkompreneble, estus bone havi sufiĉe facilan internacian lingvon por la sciencaj interrilatoj. Estu ĝi eĉ Esperanto. Kaj por la hungaro, kaj por la japano, kaj por la somaliano estus pli facile skribi en E-o ol aktive alproprigi iun vivantan lingvon kaj elspezi por tio multajn jarojn. Sed domaĝe: la tuta teknika kaj scienca literaturo estas verkita ruse, angle, france kaj ne E-e. Se, ni supozu, japana kemiisto eklernus E-on, sed scius nek angle, nek ruse, li ne povus sekvi la modernan literaturon pri sia fako. Kaj tio estus danĝera por la kemiisto. Pro tio li preferas vivantajn lingvojn.*

*La artefarita lingvo nur tiam estos vaste disvastiĝinta, se per ia miraklo la plejparto de sciencaj kaj teknikaj verkoj aperus skribitaj tiulingve. Ni ne divenadu, ĉu eblas tia miraklo.*

*Tiel, la feraj leĝoj de la scienco nomata lingvosociologio malhelpas la realiĝon de artefaritaj lingvoj por internaciaj rilatoj. Sed la laboro farita por ilia kreado dum kelkaj jarcentoj tute ne estis vana. La serĉado de „tutmonda" lingvo kondukis ofte al interesaj kaj tre valoraj trovaĵoj . . ."*

Komente: Tion, kion la aŭtoro nomas „miraklo", ni nomas *rezulto de evoluo*. Kaj la esperantistoj, estante optimistoj, kredas je la evoluo!

V.

Estas multe pli danĝere, se falsaj indikoj aperas ne en monografioj, kiujn oni rajtas kritiki, akcepti aŭ refuti, sed en lernolibro, kiun oni devas lerni. Ege bedaŭrinde estas do, ke en la — cetere eminenta — universitata lernolibro de prof-o REFORMATSKIJ aperis tute falsaj indikoj, atestantaj pri lia kompleta neinformiteco. La lernolibro „Enkonduko en la lingvosciencon", 542-paĝa, aperis en sia 4-a eldono en 100 000 ekzempleroj (!); ĝi okupiĝas pri la interlingvistiko en sia 91-a ĉapitro entute sur 1,5 paĝoj. La aŭtoro komencas per Descartes kaj Leibnitz, parolas pri Volapük kaj Schleyer, fine pri Zamenhof kaj E-o. Ĉi lastan parton mi citas laŭvorte:

„*Tre rapide E-o havis sukcesojn en multaj landoj, ĉefe inter kolektantoj (precipe filatelistoj), sportistoj, eĉ komercistoj, same inter certaj lingvistoj kaj filozofoj; aperis en E-o ne nur lerniloj, sed ankaŭ diversaj literaturaĵoj, inter ili ankaŭ beletraĵoj tradukitaj kaj originalaj — ĉi lasta apenaŭ estas aprobebla, ĉar, malgraŭ ĉiuj sukcesoj, E-o kaj la similaj al ĝi lingvoj restas ĉiam sekundaraj kaj „aferaj", t. e. ekzistantaj ekster la stilistiko. E-o estis ĉiam uzata kiel helpa, sekundara, eksperimenta „lingvo", en kompare malvasta medio. Pro tio ĝia sfero estas pure praktika; ĝi estas ĝuste „helplingvo", „peranta lingvo", eĉ tia nur koncerne la okcidentajn lingvojn, estante fremda por la orientaj lingvoj. La ceteraj helpaj internaciaj lingvoj (adjuvanto, ido) tute ne havis sukcesojn.*

*Ĉiuj tiaj „laboratoriaj inventaĵoj" povas havi sukceson nur en certa praktika sfero, ne pretendante esti lingvo en la plena senco de la vorto. La similaj „suplementaj interkomunikiloj" estas senigitaj de la bazaj kvalitoj de veraj lingvoj: ili ne havas popolan bazon kaj vivan evoluadon, kion ne povas anstataŭi la direktiĝo al internacia terminologio, nek komforteco de vortfarado kaj frazkonstruo."*

Ni ne diskutis pri la antaŭaj verkoj, havantaj ne nur negativajn, sed ankaŭ pozitivajn elementojn. Ili estis nur monografioj. Sed aŭtoritatan universitatan lernilon ni devas kontraŭargumenti, des pli ke ĝin povas legi ankaŭ iu E-faka mia studento kaj ĝi povus detrui en li lian tutan entuziasmon kaj studemon.

1. *Pri la dividiĝo de e-istoj* laŭ hobioj kaj profesioj ni ne havas fidindajn indikojn. Ni estas vere scivolaj, de kie la aŭtoro ĉerpis la siajn, aŭ kiu misinformis lin?

2. La *E-a literaturo* ne povas esti objekto de akcepto aŭ refuto: ĝi estas fakto. Nur tiu scias pri ĝi nenion, kiu ne klopodis trarigardi almenaŭ kelkajn ĝiajn volumojn.

3. La *eksterstilistikeco de E-o* estas vere io nova, kaj, sincerdire, ne tute komprenebla. Ĉu tiu ĉi mia artikolo havas nenian stilon? Amaso da tradukoj ekzistas el E-o alilingven kaj inverse, ĉu „eksterstile"? Kaj kiel kompreni, ke E-o povas esti pontolingvo ĉe arta traduko? La epopeeto „Johano la Brava" de Petőfi estis tradukita el la E-a traduko en la ĉinan lingvon, kaj dank' al la brila kaj fidela traduko de K. Kalocsay estas tiel same fidela al la originalo, eble pli ol se ĝi estus rekte tradukita. Petőfi probablege ne verkis eksterstile, kaj se la E-a traduko eksterstiliĝis, tiam ankaŭ la ĉina traduko, aperinta en pluraj eldonoj, devus esti eksterstila. Kiel traduki eksterstilan tekston en ian stilon?

(Ni memorigas la aŭtoron pri la vortoj de *Weaver*, kiuj eble helpos kompreni la problemon: „Kiam mi rigardas artikolon verkitan ruse, mi diras: Ĝi estas verkita anglalingve, sed estas ĉifrita per nekonataj simboloj. Nun mi komencas ĝian deĉifradon.")

4. Ke *E-o estas „helpa, sekundara lingvo"*, tio estas akceptebla tiusence, ke neniu pretendas ĝin fari la unua,

primara, ekskluziva lingvo de ĉiuj. Sed ĉu oni povas nomi „eksperimenta" lingvon, en kiu internacia, interkontinenta laborantaro verkis ampleksan bibliotekon da literaturo?

5. Ĉu Esperanto estas *„fremda por orientanoj"?* Ni aldonas: ankaŭ por okcidentanoj ĝi estas fremda, ĉar ĉiu fremda lingvo estas fremda. Kiu lingvo estas pli aŭ malpli fremda, tio dependas ne de ĉieldirekto aŭ mondregiono, sed de la interferenco de la du lingvoj. Ĉu por japano E-o estas pli fremda ol la angla lingvo, mi dubas.

6. La mencio de *„ceteraj helplingvoj"* montras absolutan nekonon de interlingvistikaj faktoj. Pri Adĵuvanto (eble Adjuvanto) tute ne estas pruvite, ke ĝi ekzistis. Mencii ĝin kaj ne mencii Interlingva, Interlingve, Novial, kiuj almenaŭ funkciis aŭ funkcietas, vekas rideton. Ĉiuj havantaj ĉe ni B-diplomon de E-o scias tion!

La *socilingvistikaj problemoj* (popola bazo kaj evoluebleco) de E-o postulas iom pli da loko kaj ne estas enkadrigeblaj ĉi-artikole. Pri ili mi intencas okupiĝi sekvanumere.

*Resumo:* Per kelkaj sporadaj ekzemploj mi intencis montri, kiel kelkaj nuntempaj lingvistikaj verkoj opinias pri E-o. Mi povus citi multajn pli favorajn opiniojn (ekz-e tiun de Mario PEI), sed tiuj estas pli konataj, kaj krome, la kontraŭopinioj nin instigas serioze studi kaj kulturi nian lingvon por esti ĉiam pretaj rebati ilin per seriozaj (kaj ne banalaj) argumentoj. Je tio nin devigas ne nur la intereso de E-o, sed ankaŭ la intereso de la *scienca vero*, la plej elementa kaj forta postulo por ĉiuj okupiĝantaj pri scienco.

# ALARMO!

*Ŝatata programo de la hungara televido estas la „Blua Lumo", kiu informas la publikon pri diversaj krim-aferoj, ne fikciaj, sed fakte okazintaj. Dum la programo ordinare iu reportero parolas kun la kulpuloj.*

*Nun temas pri junula bando, t. n. „galerio", kies anoj tute ignoris la posedajn pronomojn, ne distingante inter mia kaj via kaj lia. La intervjuanto scivoladas pri la kialo de la enkulpiĝo. Mi aŭdas ŝablonajn motivojn: alkoholo, laborabomeno, kartludado ktp. La lasta heroo estas la „ĉefo".*

*— Mi estas honestulo, — li deklaras. — Mi havas konstantan laborlokon. Sed mi edziniĝis antaŭ nelonge kaj mia edzino ne scias kuiri. Tial mi manĝadis en restoracio kaj por ties kostoj ne sufiĉis mia salajro. Tio min kondukis sur misvojon.*

*Fulmotondre trapikis mian cerbon tiu konfeso, tiu enkulpiga motivo. Jen, temas do ne tiom pli kulpulo, kiom pri viktimo. Kaj mian koron ektordis konscienc-riproĉo, rememorante pri la fuŝitaj manĝaĵoj, trosalitaj supoj, brulgustaj legomaĵoj, per kiuj mi tiel ofte regalas mian edzon. Kaj kun granda ŝoko mi rekonis la gravan danĝeron, kiu minacas certe ne unu edzon sur la terglobo.*

*Edzinoj! S. O. S. Ni savu la edz-animojn! Eble ankoraŭ ne malfrue! U. L. K*

*Tio estas: Urĝe Lernu Kuiri!*

**—eta—**







**Ne nur Esperanto estas internacia lingvo!**

Por fakuloj ankaŭ kibernetiko estas rimedo por interkompreno. Petu informilon pri komputiloj de dua generacio,

**tipo EMG 830,**

kaj pri tiuj de tria generacio,

**tipo EMG 810,**

produktataj en Hungario!

✳

Informojn donas la Komerca Ĉefsekcio por Komputiloj de la Fabriko de Elektronaj Mezurinstrumentoj

Budapest XVI., (Sashalom) Cziráki u. 26—32.
Telefono: 636-045, 837-950/176

Jozefo Mátéffy

# La defendo de artobjektoj en la spegulo de niaj 25 jaroj

*Kiel homoj posedas objektojn, relikvojn ial speciale al ili karajn kaj gardatajn ame kaj zorge, tiel ankaŭ la nacioj havas postrestintajn artobjektojn, historiajn monumentojn, kiuj estas ŝatindaj kiel atestantoj pri la paseo de l'nacio, pri la evoluinteco de la siatempa arto, kiel fidelaj informantoj pri la ĝenerala kultura kaj ekonomia stato de la nacio en la iama epoko. Estas do motivite, ke ĉiu kulturpopolo rigardas ilin naciaj trezoroj, fieras pri ili kaj zorgas institucie pri ilia defendo.*

*Ju pli malmultajn artobjektojn postrestintajn havas iu nacio, des pli zorge ĝi devas plenumi ilian efikan protektadon. Nia lando, dum sia miljara nacia ekzisto, multe suferis de sangaj detruaj militoj kaj fremda subpremo. Do ne nur la feraj dentoj de la tempo, la indiferento de la homoj akcelis la pereon de niaj historiaj monumentoj, sed ankaŭ intenca detruado dum militoj, eĉ el imperiestra ordono. En la 18-a jarcento la Habsburga dinastio eksplodigis vicon de mezepokaj hungaraj fortikaĵoj, timante ke eventuala nova revolucio metos en ili neston. Ne malgrave do klopodi por la konservado almenaŭ de tio, kio restis.*

Loĝturo de fortikaĵo Rákóczi en Sárospatak el la 13a jarcento

Kavalirhalo de reĝo Sigmundo (1387—1437) en Burgo de Buda

*La institucia defendo de niaj historiaj monumentoj ricevis laŭleĝan bazon en la pasinta jarcento ((1881). Tiu leĝo konformiĝis, nature, al la tiam regantaj kapitalismaj principoj: la privata posedanto povis nelimigite disponi pri la artmonumentoj, rajtis ilin eĉ malkonstrui, se li ne volis ilin konservi kaj se la ŝtato kompreneble ne povis efike realigi la deziratan celon: la daŭran protekton. La radikala ŝanĝo en la proprietaj rilatoj post nia liberiĝo en 1945 donis eblon krei modernan, vere efikan novan leĝon. Ĝin*

*karakterizas jam tute alia spirito. Ĝi rigardas la artmonumentojn kultura valoro de la nacio, nepre defendenda heredaĵo. El ĉi tiu ĉefa tezo estas deduktitaj tiuj disponoj, kiuj devigas la proprietantojn kaj uzantojn de la artmonumentoj je restaŭrado, konservo, defendo. Dum la lastaj 25 jaroj alformiĝis ankaŭ la plej konvenaj centraj organoj: Tutlanda Inspektoraro por Artmonumentoj, kaj aparte la Budapeŝta Inspektoraro. Ambaŭ ricevas signifan ŝtatan financan apogon. Ĝi atingis jam 55 milionojn da forintoj jare.*

*Tre gravaj estas ankaŭ la koneksaj kulturaj, sciencaj laboroj. Bazo de la scienca laboro estas la registro pri la ekzistantaj artmonumentoj. Tiun antaŭis sistemaj surlokaj kaj arkivaj esploroj kaj pretigo de multaj topografioj pri urboj, komunumoj kaj regionoj. Tiel pretiĝis la unua oficiala listo pri niaj defendendaj artobjektoj. La katalogo enhavas preskaŭ 10 000 objektojn.*

*Ankaŭ la metodo de la restaŭraj laboroj moderniĝis. Celo estas ne nur science fidele restarigo, sed ankaŭ tio, ke la konservitaj artobjektoj veku artan travivaĵon en la spektantoj.*

*Fine, sed ne lastvice, belan rezulton montras la ĉi-koncerna populariga laboro. La protektado de niaj naciaj valoroj nun jam ne estas nura afero de la fakuloj, sed havas larĝan popolan bazon. Amasoj interesiĝas pri la tradicioj de la hungara paseo, pri la memoraĵoj de la popola kreokapablo. La eldono de grandnombraj popularigaj verkoj, libroj ktp. apenaŭ povas kontentigi la tiurilatan kultursoifon de nia popolo.*

*La plej grava merito kaj rezulto de la 25-jara evoluo sur la pritraktita kulturtereno estas: ĉeso de indiferento kresko de interesiĝo pri niaj artobjektoj kaj historiaj monumentoj. Ni ne forgesu ja, ke ili ne nur instruas historion, sed samtempe edukas je vera patriotismo kaj poluras la artisman guston.*

Enirpordego de fortikaĵo Siklós



# NAJBARECO, AMIKECO

## Aŭstrio

ESPERANTO-KONTAKTOJ KUN HUNGARIO. — Al la „Aŭstra-hungara Esperanto-kulturvespero" en la Hungara Kolegio de Vieno partoprenis 120 personoj, inter ili ankaŭ membroj de la Aŭstra-Hungara Societo. Dum tiu vespero le ges-roj *Max Finkenzeller* per filmo, *Berti Smutny* kaj *Sarkis Arsenien* raporte, kaj *Hugo Kraus* per lumbildoj memorigis pri sia restado en nia najbarlando en la jaro 1969. La temoj estis „La Pentekosta rendevuo en Budapeŝto", „La Somera Esperanto-Universitato en Gyula" kaj „En Miŝkolc kvazaŭ hejme". Inter la raportoj s-ro *Emil Vokal* laŭtlegis leteron de s-ino *Valeria Szabó* (Budapeŝto), kiu el vidpunkto de hungara samideanino priskribis siajn impresojn pri la sukcesaj kontaktoj inter la esperantistoj de ambaŭ landoj. Lernantinoj de la Esperanto-klaso de s-ino ĉefinstruistino *Marischler* prezentis poemojn de Sándor Petőfi kaj Julio Baghy en Esperanto. La solenan aranĝon malfermis d-ro *Peter Haeseler*, prez. de AHS, kaj d-ro *L. Grimme*, prez. de AEF. Dum siaj enkondukaj vortoj s-ro Hugo Kraus ankaŭ povis laŭtlegi salutan leteron de la prezidanto de Hungara Esperanto Asocio, d-ro *Jozefo Mátéffy*. La sukcesan aranĝon finis prezentado de hungara kultura sonfilmo „La rivero Tibisko" kaj agrabla kunestado dum regalado, donita de la gastiganta Aŭstra-Hungara Societo. Krom la du menciitaj organizoj ankaŭ Societo por Internacia Kontakto estis invitanto al la vespero.

**H. K.**

## Bulgario

*RIPOZOJ REAPERAS! — Ekde januaro 1970 la 52-paĝa, lukse ilustrita esperanto revuo Ripozoj reaperas, enirante en sian sesan jaron. En ĉiu numero ĝi dediĉos paĝojn al la internacia esp. movado. Landaj asocioj, fakaj organizaĵoj, lokaj societoj, delegitoj de UEA estas petataj sendi al ĝia Redakcio informojn pri sia agado kaj sukcesoj. Kontribuo per artikoloj — dezirata. Abonkotizoj pagita por 1969, validas por 1970. Adreso: RIPOZOJ, Bdo Tolbuhin 51, Sofia, Bulgario.*

## Germana Demokratia Respubliko

87 PLENE AŬTOMATIGITAJ UZINOJ. — La altaj rezultoj de la laboruloj speguliĝas ankaŭ en la nacia enspezo, kiu kreskis de 98,018 je 103 miliardoj da markoj. La investojn, kiuj altiĝis de 26,470 ĝis 30 miliardoj da markoj, precipe profitis la ĉefindustriaj branĉoj. Pri tio atestas la 87 plene aŭtomatigitaj uzinoj, kiuj komencis la produktadon fine de 1969. Kiel modelaj por la majstrado de la scienco-teknika revolucio menciindas la ilarmaŝina uzino en Magdeburg, la lavil-uzino en Schwarzenberg kaj la kablo-uzinego „Oberspree" (Supera Spree-rivero) en la ĉefurbo Berlin. Ĉi-rilate estu menciite, ke la ŝtataj elspezoj por esploroj kaj akcelo de scienco kaj tekniko altiĝos per 22 procentoj, respektive per 3,6 miliardoj da markoj.

*

*273 000 gestudentoj.* — Pluajn sukcesojn oni atingis ankaŭ en la socialisma klerigado. La nombro de la lernantoj kiuj pluiris post absolvo de la 8-a klaso en la 9-an, plialtiĝis de 79 je 82 procentoj. La studadon ĉe la universitatoj kaj altlernejoj 1969 komencis ĉirkaŭ 342 500 kaj en vesperaj lernejoj 50 500 gestudentoj. Entute oni aktuale profesiklerigas 273 000 gestudentojn en altlernejoj kaj faklernejoj. La alvoko, majstri la scienco-teknikan revolucion, falis sur fekundan grundon ĉe la laboruloj de GDR. *(Panorama DDR. — Auslandspressedienst GMBH)*

*

SOLIDARECO KUN VJETNAMIO. — La impertinenta daŭrigo de la krima agresmilito de Usono en Sudvjetnamio ne devas endormigi la lukton de pacamikoj. Tial denove kaj ĉiuokaze ni demonstru kontraŭ ĝi kaj deklaru al niaj leteramikoj la verajn kaŭzojn. Nia grupo kolektis dum la lastaj du jaroj 2 186 protestsubskribojn kontraŭ la murda milito de Usono kaj konvinkis 35 civitanojn por unufoja senkosta sangodonaco al vunditaj Vjetnamoj. Ni petas skribi al ni multfoje kiel vi uzas Esperanton en la lukto por paco kaj por progresa kulturmovado. En frata interligeco! — Esperanto-grupo „Popolamikeco" mane Kurt H e e g, 962 WERDAU, GDR, Ziegelstr. 20.

## Pollando

ORATORIO DE OSWIECIM. — La 27-an de januaro 1970 pasis la 25-a datreveno de la liberigo de la koncentrejo en Auschwitz-Oswiecim. En la kadro de la datrevenaj solenaĵoj en la iama hitlera mortotendaro okazis la unua plenumo de la „Oratorio de Oswiecim", vort-muzika komponaĵo. La aŭtorino de la teksto estas konata literaturistino kaj esperantistino — *Alina Novak*. La muzikon por la teksto de Alina Novak, bazita sur memorlibro de akuŝistino en Auschwitz, komponis *Jezry Maksymiuk* kaj la kantojn — tre populara pola kantistino, *Anna German*. La pola teksto de la Oratorio estis verkata kune kun la esperantlingva varianto. Tio ebligos prezenti ĝin fragmente al la geaŭskultantoj de la Pola Radio.

*

*Esperanto en la Pola Akademio de la Sciencoj.* — Ĉe la loka Biblioteko de la Pola Akademio de la Sciencoj en Gdansko ekfunkciis Esperanto-fako. En malnovaj kolektoj de la Biblioteko estis trovitaj multaj raraj E-eldonaĵoj, eĉ de antaŭ la I-a mondmilito.

*Esperanto en Laborista Universitato.* — En Olsztyn oni fondis junularan rondon de esperantistoj ĉe la Laborista Universitato de la Asocio de Socialista Junularo (ZMS).

*Valoraj premioj de la Pola Radio.* — Du esperantistoj — sinjoroj *Syfke Musch* el Nederlando kaj *Julio Szabó* el Rumanujo — gajnis redioaparatojn kiel premion pro la partopreno en la Konkurso de la Pola Radio, lige kun la II-a mondmilito. Aliaj 20 partoprenantoj gajnis lotume belajn memordonacojn—muzikdiskojn, librojn, popolartojn ktp.

(Sendis artikoletojn: Pola Radio, Esperanto redakcio.)

## Sovetunio (Ukrainio)

... Dank al magia ŝlosilo — Esperanto — mi mem, estinte esperantistino nur ekde 1966, jam sukcesis dum lastaj tri jaroj „malfermi la pordojn" de tri amikaj landoj: Bulgario, Pollando, Hungario, Ĉiuj tri miaj vojaĝoj estis bonegaj kaj neforgeseblaj, ĉie mi trovis afablan, varman akcepton kaj bonajn amikojn. Sed tiu gastemo, kiun mi renkontis en Hungario, superis ĉiujn miajn atendojn. Kvazaŭ unu sennuba feliĉa tago forflugis por mi la kvar semajnoj sur la gastema hungara tero. Belulo Budapeŝto, vasta blua Danubo kun sveltaj aĵuraj pontoj, belega Margit-insulo, majesta monumento de Libereco sur la pinto de Gellért-monto, de kie etendiĝas neripeteble belaj panoramoj de la urbo, kaj sur kies piedestalo estas elĉizitaj poreterne multe-multe da nomoj de sovetaj soldatoj kaj oficiroj, kiuj heroe pereis dum la bataloj por la hungara ĉefurbo. Riĉaj muzeoj, bildgalerioj, bibliotekoj, grandega universitato, belaj parkoj, monumentoj. Kiu almenaŭ unu fojon estis en Budapeŝto, tiu nepre por ĉiam enamiĝos al ĝi kaj forgesos ĝin neniam.

Krom Budapeŝto mi sukcesis viziti ankoraŭ kelkajn vidindajn urbojn de Hungario, konatiĝi kun la pitoreska, antikva „urbeto de pentristoj" Szentendre, kun la suna ĉarma Szeged, kun la iama rezidejo de hungaraj reĝoj Esztergom kaj ĝia belega Baziliko, mezepoka fortikaĵo kaj reĝa palaco de 13 jarcento. Mi vizitis ankaŭ en Győr . . .

Multajn neforgeseblajn belajn rememorojn kaj impresojn postlasis en mia koro tiu vojaĝo. Mi multe vidis, spertis, komparis, eksentis mem, ne en fremda percepto, la „aromon", la spiriton de la lando kaj ĝia popolo kaj revenis hejmen vere postlasinte en tiu jam ne fremda por mi lando parteton de mia koro . . . .

**Nadia Andrianova, Kievo.**


Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

**EN STACIDOMOJ**
**restoracio, bufedo, nutraĵ-pavilono**
**EN TRAJNOJ**
**litvagono, restoracivagono, bufedvagono**
**EN ŜIPOJ**
**restoracio, bufedo**
**EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ**
**bufedo**

UTASELLÁTÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informilon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno Budapest V., Veres Pálné u. 24 Telefono: 189—900/160

# NUR POR VIRINOJ

Graseco, dikeco, medicinlingve adipozo, ne ĉiam estis malŝatata: ni pensu nur pri la virin-figuroj de Rubens. Oni opiniis, ke al viro kelke da ventrodiko donas aŭtoritaton, kaj, koncerne virinojn, la „farĉita kolombo" sonis pli flate ol moke. Montris jam pri gustoŝanĝo, ke poste oni komencis apliki la eŭfemismon: plen-svelta. Kaj nun, se oni rigardas la manekenojn, oni sentas fantomi la viktimojn de la hitlerejaj lageroj, tamen oni devas klaki de plaĉo per la lango.

Propre el medicina vidpunkto tiu eksmodiĝo de troplenaj korpoformoj estas salutinda. Niaj ostoj, artikoj, muskoloj, koro kaj arterioj-vejnoj estas tajlitaj por normala korpopezo. La kolektita graso ŝarĝas ilin per troa pezo, kaj el tio sekvas diversaj perturboj: arterioskleroźo, apopleksio, kor-infarkto, ktp. Certaj asekuraj asocioj kalkulas pli grandan tarifon por grasuloj, ĉar ĉi tiuj, laŭ la spertoj, vivas malpli longe. (La graseco kaŭzata de hormon-perturboj estu ekster temo kiel afero kuracista.)

Do kontraŭ la graso pledas du grandaj gravaĵoj: modo kaj sano! Sed kiel batali kontraŭ ĝi?

Nu, plej bone estas preventi la dikiĝon, kaj ankaŭ pli facile, ol perdi la superfluajn kilogramojn per severa dieto aŭ „magrigaj piloloj". Oni ne prenu en sin nutraĵojn super sia bezono de kalorioj! La pluso, nome, amasiĝos en la korpo kiel graso.

Oni ofte aŭdas la plendon: „Mi manĝas tre modere, kaj tamen mia pasintjara robo jam estas strikta." Nu jes, oni heroe sin bridas ĉe la ĉefmanĝadoj, sed ŝajnnaive pekadas ĉe „krommanĝetoj", „frandetoj". Tage du tasoj da kafo kun sukero: 110 kalorioj. Glaso da biero: 270 kalorioj. En societo: duondecilitro da brando kun iom da dolĉaĵo: 600 kalorioj. Jen, nia heroino „pretere" konsumis preskaŭ la duonon de la taga kalorio-bezono de nelaborantino. La rezulto: kelkaj milimetroj ĉe la zonlinio. Poste ekzistas dommastrinoj, kiuj viktimiĝas pro sia ŝparemo: domaĝante forverŝi la manĝrestaĵon, ŝtopas ĝin martire en sian plenan stomakon.

Kion fari do? Kunmeti tian tuttagan menuon, kiu enhavas ĉion necesan (albuminoj, karbohidratoj, vitaminoj), sed ne ŝarĝas nin per superfluaj kalorioj.

La kalorio-bezono de virino estas, laŭ diversaj tabeloj, po 2000—3000 kalorioj tage, depende de aĝo, laboro, staturo ktp. Pli da ili fariĝas en ni graso.

Nun ni vidu la proksimumajn kaloriokvantojn entenatajn en 10 dg.-oj de diversaj manĝaĵoj:

| | |
|---|---|
| porkviando (grasa) | 400 |
| porkviando, bovoviando (malgrasa) | 150 |
| fiŝo | 100 150 |
| kokido | 130 |
| graso | 920 |
| lardo | 720 |
| ovo (unu peco) | 80 |
| butero | 760 |
| kazeo (malgrasa) | 120 |
| lakto (unu dcl-o) | 60 |
| fromaĝo | 300—400 |
| pano | 240 |
| farunaĵo | 380 |
| rizo | 360 |
| terpomo | 90 |
| legomaĵo | 60— 80 |
| frukto | 40—100 |
| sukero | 420 |
| mielo | 340 |
| vino (unu dcl-o) | 60—150 |

Grasemuloj evitu panon, farunaĵojn, dolĉaĵojn, grasaĵojn. Rekomendeblaj: kuirita ovo, kazeo, sukermalriĉaj fruktoj, legomaĵoj ne fritfarunitaj, malgrasaj viandoj.

Ne nur multa manĝo sed ankaŭ malmulta moviĝado povas grasigi. Sekve, se ni jam ne povis ne cedi al la delogo de la „malpermesita dolĉaĵo", ni klopodu poste absolvi la pekon per abunda gimnastiko (granda dompurigado estas eminente utila!).

Oni scias, ke ekzistas diversaj tipoj staturaj, eble jam familie hereditaj; tial propre ne troviĝas rimedoj, per kiuj nepre kaj ĉiuokaze iu ajn povus sin sorĉi feine svelta. Por konsolo ni diru, ke ankaŭ diketa virino povas esti plaĉe linda, kaj inverse; la maljuna virgeneracio eĉ opinias, ke la nunaj junuloj konfesas sin maldikamaj nur pro timo je la modo. Tamen, ankaŭ interne de la unuopaj tipoj ne estas indiferente, kiom estas la nenecesa pluso de kilogramoj.

En la tutmonda sanitara tago en 1963 la devizo de WHO estis: „Batalo kontraŭ la malsato". Ni, hungaroj, ne rilatigu tion al ni kaj ne plimultigu la englutatajn kaloriojn. Prefere ni dediĉu kelkfoje tagon kontraŭ la ĉirkaŭe tentantaj spicaj nutraĵoj, kontraŭ la trosato kaj grasiĝo. **—eta—**

# KUK-RECEPTO

**(Nerekomendebla por malgrasemuloj**

**Hungara specialaĵo: rulkuko farĉita per papavsemoj aŭ Juglanda kerno**

*FARUNAĴO: Knedu 40 dg-ojn da faruno + 16 dg-ojn da graso (aŭ 20 dg-ojn da margarino) + 2 dg da fermento (gisto) + iom da salo + lakto aŭ kremdensaĵo tiel, ke la miksaĵo estu mezmalmola sur la knedotabulo. Poste ĝin dividu en du egalajn partojn kaj ĉi tiujn kovru per tuko kaj ripozigu almenaŭ dum unu horo. Poste ambaŭ partojn etendu je platoj de po 40 × 25 cm-oj.*

*FARĈAĴO: Prenu 20 dg-ojn de muelitaj papavsemoj aŭ muelitaj jugland-kernoj, 15 dg-ojn da sukero iom vanilita, raspitan citronŝelon kaj iom da sekvinberoj (rosinoj, korintoj). La miksaĵon kuiru en akvo, konstante ĝin kirlante, ĝis ĝi fariĝos densa.*

*FARĈADO: Sur la farunaĵ-platojn ŝmiru la farĉaĵon deziratan dike, duoble dike ol la plato mem, poste rulvolvu ilin en rulaĵon rektan, ŝmiru ties supraĵon per ovo kaj baku ĝin en antaŭhejtita bakujo. La pretan rulkukon tranĉu oblikve en tranĉaĵojn kaj pladu ĝin kun surŝutita sukerpulvoro.*

**Mária Szabó — L. K.**

*István László*

# Sporto

Post longa tempo fine ĉesis la diskutoj ĉirkaŭ la afero de la hungara nacia piedpilko-teamo. Post la malvenko en Marsejlo abdikis la gvidantaro de la Hungara Federacio de Piedpilkado. La nova estraro deziras puran sportospiriton, modernan trejnadon, laŭplanan laboron anstataŭ la pli fruaj ludista regado, ŝajntrejnado kaj korupte antaŭe interkonsentitaj matĉ-rezultoj. Sekve de tio en la landa ĉampionado jam denove kreskis la nombro de la spektantoj ĉe la matĉoj kaj ankaŭ la juna, nova nacia teamo, kunmetita laŭ la elekto de József Hoffer, la estro de la federacio, jam gajnis la fidon de la publiko. Kvankam la rezulto 2:2 en Beograd ne estas malbona, la teamo devos ankoraŭ multe pliboniĝi, por ke nia piedpilkado atingu denove internaciajn sukcesojn. La hungaraj zelotoj forte esperas, ke la nova, juna nacia teamo kun nova koro kaj batali-volo atingos la nivelon de la antaŭaj.

* * *

Eble ankaŭ nia naĝosporto komencas leviĝi el sia malalta pozicio. Tion ni povas konkludi el la plej novaj du Eŭropo-rekordoj de Andrea Gyarmati. La 16-jara Andrea, direktate de sia patrino Éva Székely, olimpika ĉampionino en Helsinko, jaro post jaro atingas pli bonajn rezultojn. En 1969 en papili-naĝo ŝi akiris la unuan lokon de la monda ranglisto. Konsidere tion, ke la ĉi-jarajn du Eŭropo-rekordojn ŝi strarigis resp. atingis en dorsonaĝo,ne estas senbaza la espero de la fakuloj, ke ankoraŭ en la nuna jaro ŝi eĉ povos strarigi mondrekordon en papili-naĝo, eventuale ĝuste en la Eŭropo-ĉampionado de Barcelono.

* * *

Granda perdo trafis nian luktosporton: en aĝo de 31 jaroj fariĝis viktimo de trafika akcidento István Kozma, nia olimpika ĉampiono, mond- kaj Eŭropo-ĉampiono, la plej sukcesa hungara luktisto de ĉiuj tempoj.

* * *

Bone komenciĝis la atletika sezono de 1970: en la urbo Salgótarján s-ino Csábi, knabinnome Magdolna Komka, starigis en altosalto 184 cm-an novan landan rekordon. Ŝia rezulto estas elstara ankaŭ mondskale, ĉar subĉiele nur du altosaltistinoj atingis ĝis nun pli grandan alton.

* * *

Okaze de la kvaronjarcenta jubileo de la liberiĝo de nia lando libro, filmo kaj nekalkuleblaj artikoloj rememorigas pri la internaciaj sukcesoj de niaj sportistoj dum la 25 jaroj. Kiel modestan kontribuon al la jubileo, ĉi-sube ni publikigas raporton en formo plej konciza pri la sukcesoj de niaj olimpikaj ĉampionoj, mond- kaj Eŭropo-ĉampionoj.

| | Olimpikoj | | | Mondĉampionadoj | | | Eŭropo-ĉampionadoj | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | 1. | 2. | 3. | 1. | 2. | 3. | 1. | 2. | 3. |
| Akvopilkado | 3 | 1 | 2 | — | — | — | 3 | — | — |
| Atletiko | 5 | 7 | 12 | — | — | — | 8 | 7 | 12 |
| Bokso | 5 | — | — | — | — | — | 7 | 5 | 11 |
| Flugpilkado | — | — | — | — | — | — | — | 1 | 1 |
| Gimnastiko | 7 | 6 | 10 | 2 | 1 | 2 | — | 2 | 1 |
| Halterado | — | 3 | 3 | 7 | 15 | 10 | 12 | 25 | 18 |
| Ĵudo | — | — | — | — | — | — | — | — | 1 |
| Kajakado-Kanuado | 4 | 12 | 7 | 12 | 13 | 14 | 24 | 16 | 24 |
| Keglado | — | — | — | 1 | 5 | 5 | 1 | 1 | 1 |
| Korbopilkado | — | — | — | — | — | — | 1 | 3 | 2 |
| Lukto | 7 | 4 | 6 | 10 | 17 | 8 | 5 | 9 | 4 |
| Manpilkado | — | — | — | 2 | 1 | 1 | — | — | — |
| Moderna pentatlono | 5 | 3 | 2 | 12 | 7 | 7 | — | — | — |
| Naĝo-Plonĝo | 4 | 4 | 5 | — | — | — | 11 | 15 | 13 |
| Pafo | 3 | 2 | 2 | — | 3 | 7 | 7 | 6 | 14 |
| Piedpilkado | 3 | — | 1 | — | 1 | — | — | — | — |
| Remo | — | 1 | 1 | — | — | — | 6 | 6 | 17 |
| Sketado | — | 1 | 2 | 2 | 3 | 5 | 5 | 5 | 3 |
| Skermo | 15 | 7 | 8 | 30 | 32 | 26 | — | — | — |
| Tablotenisо | — | — | — | 19 | 22 | 32 | 13 | 9 | 15 |
| Teniso | — | — | — | — | — | — | 1 | 1 | 2 |
| Priartaj konkursoj | — | — | 1 | — | — | — | — | — | — |
| | 61 | 51 | 62 | 97 | 120 | 117 | 104 | 111 | 139 |

**Glosoj.**

**Aĉletiko:** atletismo.

**Halĉero:** ŝtala stango ambaŭekstreme ŝarĝebla per diverspezaj feraj diskoj, por esti leveta konkurse. (Pl. V. ALD. 2.)

**Plonĝi:** fari artajn saltojn de sur diversaltaj trampoloj en naĝbasenon. (Pl. V. ALD. 1/b.)

**Skeĉo:** ŝtala surglacia glitilo fiksebla sur la ŝuo.

**Teamo:** trupo de sportistoj el la sama sportobranĉo komune partoprenantaj en konkurso.

**Trampolo:** forsaltilo ĉe saltoj en la sportobranĉoj plonĝo kaj gimnastiko.

Trad.: *Tibor Újlaky-Nagy*

# *Muzika vivo en Budapeŝto*

La Budapeŝta muzika vivo havas jam delonge bonajn kaj valorajn tradiciojn. La proksimo de Vieno, unu el la centroj de la muzika kulturo havis ĉiam sian efikon al la muzika kulturo de la ĉefurbo de Hungario.

Ne estas mirinde, ke eĉ en la nuna tempo multnombraj altnivelaj koncertoj, operprezentadoj, gastrolado de multaj hungaraj kaj internacie konataj eksterlandaj muzikartistoj karakterizas la ĉi tiean muzikan kulturon.

Ni jam raportis pri du novaj hungaraj operoj (Hamlet kaj Peko kaj puniĝo). Jam ĉi tiuj eventoj signas la seriozecon de la muzika vivo de Budapeŝto.

Karakteriza fakto estas, ke junaj hungaraj muzikartistoj ricevis la eblon montri sian talenton. Ilia nomo estos certe konata post nelonga tempo ekster sia patrujo. Kvar junaj muzikartistoj estas precipe menciindaj: Dezső *Ránki*, kiu gajnis unuan premion dum konkurso en Zwickau, Zoltán *Kocsis*, István *Lantos*, Sándor *Falvi*, unu el la plej talentaj lernantoj de la Budapeŝta Muzika Altlernejo.

Grandmezuraj verkoj estis prezentataj en Budapeŝto en la lastaj monatoj, inter aliaj la „Pasiono de Mateo" de *Bach*, la „Heroa kanto" de *Sugár* kaj la ĥora oratorio „Ribelis muĝe maro" de F. *Szabó*.

Mondfamaj pianistoj vizitis nin: *Gilels*, *Perlemutter;* la ĉembalisto *Isolda Ahlgrimm* kaj *Hans Pieschner*. La violistino *Henryk Szeryng* kaj la kantisto *Theo Adam* pliriĉigis la budapeŝtan koncertan vivon.

Ĉiutage almenaŭ unu aŭ du koncertoj kaj du operprezentadoj, jen la konstanta muzika situacio de Budapeŝto. Memkompreneble ni povas do mencii sole gutojn el ĉi tiu maro. Sed eble la gutoj donas ideon pri la altnivela muzika vivo de Budapeŝto.

**Lajos Lesznai**

**La Tutlanda Teknika Biblioteko** kaj *Centro de Dokumentado* tradukis en 1969 hungarlingven 400 000 paĝojn da fremdlingva fakliteraturo kaj faris el tiuj kopiojn sur pli ol 1,3 milionoj da paĝoj.

●

**Nombro da gvidantoj** de Usonaj vojaĝoficejoj vizitis nian landon por studi la ĉi-tieajn eblojn de turismo. Samcele restadis ĉe ni la direktoro de la vojaĝoficejo *Via Mondial* el Ĉilio.

●

**La Pfalz-Theater en** *Kaiserslautern* prezentis grandsukcese la unuaktaĵon *„Bösendorfer"* de Ferenc *Karinthy*. Tio estis la 19-a premiero de la dramo en eksterlando. La ĉeestanta aŭtoro estis varme festata de la publiko.

---

# LETERKESTO

*Baldur Ragnarsson*, Reykjavik, Islando. — „La nova numero de HUNGARA VIVO estas eĉ pli bela kaj interesa ol la antaŭj numeroj, kiujn mi recevis. Ĝin trafoliumante, tralegante kaj ĉiam admirante, mi sentas min en tre, tre simpatia medio, kie nacia kaj internacia elementoj belproporcie intermiksiĝas. Ĝia lingvo estas samtempe rektefika kaj priesplora, vera mino por vortamantoj. La bildo, kiun vi donas pri hungaraj vivo kaj pensoj, estas konvinka sen trudemo, alloga sen maskbeligo. Pri-Esperantaĵaj komentoj estas sobraj kaj penetraj, tamen laŭdezire entuziasmaj. Entute mi ne hezitas eldiri jenan opinion: HUNGARA VIVO atutas ĉiujn Esperantajn revuojn de mi konatajn. Ĝi daŭru en sano kaj prospero!" — Varman dankon pro via letero, pro via opinio.

*Vilho Setälä*, Irislahti. Via afabla skribaĵo bone montras, kiel aktuala estas la iniciato de *T. Újlaki-Nagy* en „Nuntempa Bulgario": krei sportan fakvortaron. Efektive unu el la plej favoraj terenoj por la uzo de E-o estus la sporto, ĉar la sportistoj faras ja tiom da internaciaj renkontiĝoj. Sed kion ili gajnus per tia E-o, en kiu mankas tute simplaj esprimoj sportaj? Koncerne la riproĉitajn vortojn: *memgolo* (= mem-golo) estas tia golo, kiun ano de iu trupo (teamo) venigas en la golejon de sia propra trupo. *Ŝoti* (A. shoot, F. shooter) signifas: piedbate direkti la pilkon al la golejo. *A. Pechán* en sia E-Hungara Turista Vortaro klopodis fari multajn sportajn terminojn; tie ankaŭ ŝoti estas registrita, eĉ plurfoje: *ŝoti, ŝoti foston, ŝoti pretere, ŝoti golon*. Tamen, tiu vortaro ne estas monde konata; tial estus ĝuste glosi la vorton, sed la glosidevulo preteratentis, pekis, sportlingve *faŭlis*. Nin tuŝus agrable legi de vi kelkajn simpatiajn vortojn pri nia Domfabriko aŭ alia rubriko, sed certe vi estis nebonhumora kaj tempomanka.

*Hildegard Leubner*, Pirna, GDR. Nin ĝojigas, ke vi, leginte en 1/70 pri la nepartopreno de eksterlandanoj en Domfabriko, sendis al ni vian kontribuaĵon, kvazaŭ por gardi ilian honoron. Via sendaĵo estas interesa kaj instrua. Dankon.

*Romano Grinŝpan*, Taŝkent. Ni multa dankas vin por mélta alsenditaj rimitaj proverboj, kies parton ni esperas utiligi en nia Domfabriko kaj okaze ni publikigos kelkajn ankaŭ en H. V. Multajn salutojn.

# FILATELIO

Interesa statistiko pretiĝis pri la Eŭropaj emisioj de poŝtmarkoj. Inter 1840 kaj 1914 tridek unu Eŭropaj landoj emisiis 3152 poŝtmarkojn. En 1944 jam en 35 landoj aperis 11 907 specoj de poŝtmarkoj. Ekde 1945, en 25 jaroj, 38 landoj pliriĉigis la filatelajn albumojn per 27 503 poŝtmark-novaĵoj. En la lastaj dekkvin jaroj, da poŝtmarkoj aperis preskaŭ duoble tiom, kiel en la antaŭaj sesdek jaroj. La tuta nombro de la poŝtmarko-specoj eldonitaj en Eŭropo ekde 1840 estas 42 652.

Laŭ alia informo, la poŝtodirekcioj tutmondaj „ĝojigis" en 1969 la filatelistojn per 5314 specoj de poŝtmarkoj; per 10% pli ol en 1968. Tio komprenigas la maltrankvilon de tiuj, kiuj demandas: kien kondukas tia dumpado. Eble ili povas trankviliĝi per tio, ke en la lasta jardeko la nombro de la filatelistoj duobliĝis kaj nun oni jam taksas ĝin 140 milionoj.

En februaro de 1970 aperis la unua hungara poŝtmarka serio de la jaro: „La historio de la aŭto". Sur la poaj valorpecoj videblas la jenaj aŭto-tipoj: 40 heleroj: Daimler, 1886; 60h.: Peugeot, 1894; 1Ft: Benz, 1901; 1,50Ft.: Cudell, 1902; 2Ft.: Rolls-Royce, 1908; 2,50Ft.: Ford „T", 1908; 3Ft.: Vermorel, 1912; 4Ft. Csonka, 1912. Ĉi lasta estas interesa pro tio, ke ĝi montras aŭton konstruitan de la hungara inventisto Csonka.

Je la 7-a de marto aperis serio el tri valorpecoj por propagandi la internacian poŝtmark-ekspozicon „Budapest 70". Sur la poaj valorpecoj videblas rimarkindaj konstruaĵoj Budapeŝtaj. — Sammonate aperis du poŝtmarkoj 3-forintaj por la memoro de la kosma flugo de Sojuz 6—7—8 kaj de Apollo-12. — Je la 4-a de aprilo, por la 25-a datreveno de la liberiĝo, aperis bloko entenanta 2 pecojn de 5-forintaj poŝtmarkoj. Sur la supra poŝtmarko vidiĝas la postmilitaj ruinoj, la Burgpalaco ankoraŭ fumanta, la pontoj eksplodigitaj; la malsupra poŝtmarko figuras la nuntempan panoramon de la ĉefurbo. — Je la 22-a de aprilo aperis, por la 100-a datreveno de la naskiĝo de Lenin, serio el du valorpecoj. La 1-Ft-a valorpeco montras la Lenin-statuon starantan sur la Budapeŝta placo György Dózsa, kaj la 2-Ft-a valorpeco surhavas portreton de Lenin.

---

## *Goethe-premio al hungara scienculo*

La Goethe-premion de urbo Frankfurt ĉe Main oni aljuĝis al la 85 jara hungara scienculo György Lukács. La premio estis transdonita la 28-an de Aŭgusto, la naskiĝtago de Goethe. Precipe la literaturan agadon de György Lukács koncerne al Goethe oni honorigis per ĉe tiu premio, fondita en 1927.

## ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 6366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH. The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD. Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjenste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028. Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

**Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a paĝo!**

# LA FUNDAMENTO KAJ PALACO

— la kontraŭloj de la neologismoj asertas, ke la Fundamento sufiĉas eĉ por la literaturo. Al ili donas respondon la lingvoevoluiganta poeto, verkisto: Kolomano Kalocsay en sia poemo jene:

„— Palacon pompan alpostulas
la pompe firma fundamento . . .”

— la daŭrigon de la citaĵo vidu en la vicoj: 1. vertikala 7. vertikala 62 kaj vertikala 1.



VERTIKALAJ VICOJ

(Literduoj: OE; RR; UF; ŜO; TU; IK; UI; OK; IL; EL; IV; OI; HE; EM; RF; OA; UE; ZN; PU)
2. Hispana urbo ĉe la franca landlimo. 3. Kossuth-premiita hungara verkisto (József), prezidanto de Asocio de Hungaraj-Verkistoj; aŭtoro de „Amara Pano” — tradukita de L. Somlai, eldonita de Dana Laborista Esperanto Asocio. 4. Koncerna filon de Dio (laŭ la kristanaj religioj). 5. Samspecaj literoj de vorto: neniigo 6. Nomo de hungara urbo Pécs, dum la Romia imperio, la lasta litero mankas. 8. Hungara urbo ĉe le okcidenta landlimo. 9. Hispana rivero, 927 km-ojn longa. 10. Poseda pronomo plurala. 15. Nek virseksa, nek inseksa. 17. Ĝustokaze; pri tio mi ekmemoras (franca esprimo) 21. Reen: konigas sian penson per vortoj. 22. Klasika hungara dramverkisto, aŭtoro de „La Tragedio de l'homo. 24. Ĉefa parto de preĝejinterno; kelkfoje tri aŭ kvin paralelaj partoj apartigitaj per kolonoj unu de alia. 25. Ĉambromuzika ensemblo; parto de menueto, post kiu estas ripetota la antaŭa parto. 29. Virin', okupiĝanta profesie pri eduko. 30. Fariĝanta per si mem, sen ia ekstera influo. 32. Granda rabobest' el familio de katoj. 33. Fikse kunmeti la diversajn partojn de aparato, maŝino, sur la ĝustan lokon. 34. Sen tiu pago oni ĉesigas la pluan sendon de gazeto. 36. Nomo de du malgrandaj kasteloj en Versailles; loko de packontrakto post la unua mondmilito. 39. Reen: mallongigo de ĉiujara somera esperantista aranĝaĵo de hungara urbo: Gyula. 41. Baptonomo de 22. 42. Itala monunuo. 44. Granda birdo, vivanta sur la stepoj en Afriko, Azio kaj Eŭropo. 47. 1955 m-ojn alta monto en Grekujo, apud la Tempe-valo (en la mezan kvadraton skribendaj du samaj literoj). 48. Motor' de cirkulado de sango. 51. Titolo de sepdeksep fabloj verse reverkitaj de K. Kalocsay. 52. Hungarlingva titolo de revuo de la renoviĝo de hungara literaturo (komence de la XX-a jarcento); en ĝi debutis K. Kalocsay per hungarlingvaj poemoj. 54. Apartigata de la aliaj, malhelpante ĉiajn rilatojn aŭ komunikojn. 57. Unuiĝo. 59. Komenci batalon kontraŭ malamiko. 60. . . .-triko: parto de la fiziko, kiu pritraktas la refrakton de lumradioj tra diversaj medioj. 61. Okupiĝu pri atletiko, gimnastiko aŭ pri cetera korpa ekzerco! 64. Ĉe la fino kun „o”: italdevena muzika termino, signifanta: decide prezentenda. 66. Ir', flug' supren (neologismo). 68. Reen: kron' de arboj. 69. Vegetaj', malutila por la kulturado. 72. Plej antaŭa part' de taĉmento. 74. Reen: alimaniere. 75. Araba vorto, en nomoj ofte uzata (signifas: patro). 77. Arto — latine.

HORIZONTALAJ VICOJ

(Literduoj: ME; LI; EU; IC; HO; ON; EL; NO; OP; KT)
11. Prabesta 12. Franca pentristo, impresionisto (Firmin, Auguste; 1841—1919.). 13. Kronikan malsanon karakterizatan per timo. 14. Movi ion ĉirkaŭ ĝia akso. 16. Mallongigo de estinta soveta ŝtatdefenda, politika organizaĵo. 18. Prefikso montranta grandan primitivecon, longan antaŭtempecon. 19. Solena enoficig'; elspez' por produktodona celo. 20. Instigo, sugestio. 23. Titolo de soneto de K. Kalocsay, el „Tra la stormo”. 25. Soveta ŝakĉampiono (Jevgeni). 26. Konforma al la leĝo kaj juro. 27. La membroj de societo. 28. Mondregiono, ĉieldirekto. 29. Germana etnografo, universitata profesorino (naskita: Wiegand); kun sia edzo ŝi studis vivon de indianoj 31. Pro kiu kaŭzo? 37. Reen: kvalito. 38. Ege plezuru! 40. Suprenglisi en leviĝanta termika fluo. 43. Loko plej ofte sub la tero de kie oni elfosas metalojn, mineralojn (1-a kaj 3-a literoj interŝanĝitaj). 45. Alia nomo de antimono. 46. Ekiro, ekkuro, ekflugo. 49. Movigos de iu loko al alia. 50. Natura landlimo inter Germanio kaj Pollando (en la antaŭlasta kvadrato staras du samaj literoj). 53. Grekdevena prefikso signifanta kontraŭecon. 55. DAZ. 56. . . .-Kyu: japana insularo inter Taivan kaj Kyushu. 58. Reen: itala provinco, kies centro estas Romo. 60. Fizika eco, kvociento de maso kaj volumeno. 62. Kaŭzi al iu suferon kompense de ties malbonfaro aŭ kulpo. 63. Koncerna oficialan oficiston. 65. Tia estas la fenestro, volbo en la gotiko. 67. Unupetala korolo, kies rando estas partigita en du kvazaŭlipojn. 68. Anagramo farita el la literoj de HORIA (Nicolae, Ursu), gvidanto de rumana kamparana ribelo en 1784. 70. Miksate: ora. 71. Kalocsay tradukis tri dramojn de tiu granda angla dramverkisto 72. Radikalo de acetata acido ($C_3H_2O$). 73. Rumana virnomo. Reen: aerfobi' 75. Latina saluto. 76. Reen: la vico 81. horizontala. 78. Reen: invalid', havanta ĝibon. 79. Loĝanto de urbo. 80. Senrajta proprigo. 81. Parto de helico.

**Kiel solvon sendu al ni la daŭrigon de la citaĵo. Inter solvintoj ni lotumos tri premiojn.**

La solvo de nia krucvortenigmo aperinta en la Hungara Vivo No. 1/1970 tekstas:

*Ĉar pacon kreas amo,*
*Homecon gardas ĝi,*
*Ni ĵuras, ke la flamon*
*Ne ĵetos for de ni.*

El la solvintoj de nia krucvortenigmo gajnis libropremion: Ladislao Horkay, RIVNE. C. C. C. P. Ladislao Gombos, Janik 11. okr. KOŜICE. Ĉ. S. S. R. Kéri Elemérné, RÉTSÁG.

FERI

# *La freneza simio*

*Albert Szent-Györgyi*, la Nobel-premiita hungara biologo vivanta en Usono verkis mallongan, apenaŭ 40-paĝan libron por junuloj kun la titolo: *La freneza simio;* ĝi aperis ĉe filozofia eldonejo en New York. La mondfama scienculo emfazas en ĝi, ke liaopinie *la homaro ekstermos sin mem, se ĝi, daŭrigante la nunan tendencon, uzos la rezultojn de la scienco ne por sia bono, sed kontraŭ sin mem.* La 76-jara aŭtoro, okaze de la apero de sia libro, donis intervjuon al ĵurnalisto de *New York Times*. Li deklaris, ke laŭ lia opinio la Usona socio kaj granda parto de la mondo kondutas en malsaĝa, memmortiga maniero. „Sur granda parto de la Tero la duono de la infanoj vespere kuŝiĝas malsate, kaj dume ni elspezas miliardojn por ŝtalo, fero, tankoj” — li diris. Li emfazis, ke konfesi sian vidpunkton li sentis morala devo, ĉar, kiel diris la hungara poeto *Babits:* „Inter kulpuloj estas komplic' la silentanto”.

Szent-Györgyi en sia libro alvokas unuavice la junulojn, ke ili ĉesigu ĉi tiun memmortigeman tendencon. Al la intervjuanto li deklaris, ke la Usona socio, laŭ lia prijuĝo, estas „orientata al la morto”. „Aŭskultante la informojn, legante la gazetojn, ni spertas, ke en ili grandparte temas pri milito, murdoj, masakroj, atombomboj, raketoj, gasoj, bakteriaj armiloj, vegetaĵ-pereigaj kemiaĵoj, sufokaj venenoj, mallonge: pri vivestingo. Ŝajnas do, ke ĉiu nia ideo estas orientata al la morto” — diris la mondfama biologo.

*Tr.* **Sz. Bálint**

# medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno
pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5. • Poŝtkesto 126

## EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj • Farmaciaj bazmaterialoj • Vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj • Veterinaraj drogoj • Furaĝaldonaĵoj • Laboratoriaj kemiaĵoj • Biokemiaj produktaĵoj • Radioaktivaj produktaĵoj • Volatilaj oleoj • Kuracplantoj • Resanigaj kaj amaraj akvoj

# TANNIMPEX

Eksportas la hungarajn ŝuojn de eminenta kvalito,
elegantajn peltmantelojn
kaj unuaklasajn, laŭmodajn gantojn
kaj led-galanterivarojn

BUDAPEST, VI. VÖRÖSMARTY UTCA 35.